REGO

 **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** 



movada revuo **№ 1 (98) februaro 2016**



Vladimir Bespalov
(21.01.1940-02.02.2017)

en la numero

Novojarsko-2017
Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova redaktos "Esperanton"
aperis "Intelektaj amuzoj" de Tatjana Auderskaja
al la 120-jariĝo de Eŭgeno Miĥalski
versaĵoj de Aleksandr Ĉiĵevskij

Moskvo, 2017

enhavo

01 Novojarsko-2017 (I.Kirina)
02 Novojarsk-2017. Malgraŭ ĉio (G.Basov)
03 Novtipa Zamenhof-Tago en Moskvo (I.Gonĉarova)
06 Bulteno de REU
15 Nova redaktora paro por la revuo "Esperanto"
16 Retejo por aktivuloj kaj aktivemuloj
17 Laboru kune kun UEA
18 "Intelektaj amuzoj" de Tatjana Auderskaja
19 Amuzaj, sed ne kontuzaj! (L.Novikova)
21 Dialektika poezio (N.Gudskov)
26 Versaĵoj de E.Miĥalski kun la tradukoj al la rusa de L.Novikova
37 Versaĵoj de A.Ĉiĵevskij kun la tradukoj al Esperanto de K.Ilutoviĉ
k3 8-a Moskva Esperanto-renkontiĝo
k4 Jubileaj datoj de la jaro 2017



novaj redaktoroj de la revuo "Esperanto"

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 1 (98) februaro 2017

aperadas ekde 2000

redaktas **Georgij Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2017:

por loĝantoj de Rusio – 850 rubloj, sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo "Яндекс.Деньги"

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

elektronika abono – *400 rub. (10 eŭr.)*

NOVOJARSKO-2017

La 30-an de decembro 2016 – la 05-an de januaro 2017 en Novosibirsk sukcese pasis Esperanto-renkontiĝo Novojarsko-2017. La E-aranĝon partoprenis 1 franco, 1 hispano kaj 29 personoj el Rusio (venis 1 el Berdsk, 1 el Barnaul, 1 el Ĉeljabinsk, 2 el Jekaterinburg, 4 el Tomsk, 5 el Krasnojarsk, 15 el Novosibirsk). Estis 5 familioj: Katerina Arbekova kun la filino Darija kaj la edzo Andrej Klujev el Novosibirsko, Irina Kirina kun la filino Anna Pavlova el Jekaterinburg, Evelina Sokolova kun la edzo kaj filo – Rustam kaj Jan Karapetjan el Krasnojarsk, geedzoj Birulin Aleksej kaj Raŝida el Tomsk, Ŝaŝa Kacko kun la edzino Sveta el Novosibirsk.

La plej ĉarman impreson lasis ĝuste la dumnokta festa bankedo kun multaj distraĵoj, konkursoj, dancoj, kantoj, promenadoj tra la festanta urbo kun fajraj pafsalutoj, ĉirkaŭ bele ornamitaj grandaj abioj kaj piceoj...

En aliaj tagoj okazis ekskurso en la urbo, vizitoj al la parko Zajelcovskij (skiado, teumado en mongoleska teumejo...), al la zoologia parko kaj al la japana domo, ekskursoj en la Akademia urbeto apud Novosibirsk kaj al Muzeo de Suno.

La aliaj programeroj okazis en la E-klubejo. Hispana e-isto Rafael Mateos Gonzales kelkfoje gvidis konversacian rondon pri la temoj: “Kio estas lingvo”, “Kial Esperanto ne estas lingvo”, “Kio estas bona Esperanto” ktp. Okazis diversaj E-ludoj, E-kvizoj kaj E-konkursoj, kiujn gvidis la prezidantino de Novosibirska E-Klubo Katerina Arbekova kaj Evelina Sokolova el Krasnojarsk. Tomskano Gennadij Basov gvidis konkurson de sciantoj de maloftaj E-vortoj.

La 3-an de januaro okazis la plej interesa kvizo, kiun gvidis Evelina Sokolova, pri diversaj okazintaĵoj en la mondo, kiun gajnis 2 teamaj paroj – Vladimir Jurganov kun Irina Kirina kaj Gennadij Basov kun Galina Graĉova.



La ĉefa celo de la renkontiĝo Novojarsko-2017 – adiaŭi la pasintan jaron kaj kune renkonti la Novan kaj kunigi homojn de Siberio kaj Uralo kun invito de eksterlandanoj – estis plenumita.

La renkontiĝo rezul-

tiĝis internacia, amika, pozitiva, familia kaj scienca. Grandegan dankon al Katerina Arbekova kaj ŝia familio!

Irina Kirina (Tjumenj)

NOVOJARSK-2017. MALGRAŬ ĈIO.

Unu mia konata poeto (ĉi-jare jam 80-jariĝanta!), kiam mi diris, ke por versfarado mi estas malkapabla, respondis: "Bagatelo, estas simple, trovu trafan lastan vorton kaj rime konstruu supren kvarlinion!". Kiam mi pensis kiel titoli ĉi artikolon, eble mi sekvu la konsilon? Kaj post reveno el Novosibirsko mian impreson ĝuste respegulas "Malgraŭ ĉio". Des pli, kiam mia kolego demandis – "Kie vi pasigis la Novjaran feston?". – "En Novojarsk, en bona espa kompanio". – "Ĉu Esperanto ankoraŭ ne mortis?". – "Jes, malgraŭ ĉio, ĝi vivas, eble ne tiom vigle". Li tre miris.

Malgraŭ ĉio, pli ol 25 esperantistoj tostis kaj post la 12-a bato drinkis/trinkis je la Nova 2017-a jaro! La tablo estis riĉa kaj abunda – tiom, ke ni post la dormo tag- kaj vespermanĝis tion kion ne sukcesis enstomakigi dum la festeno!

Oni povus demandi: "Kial 'malgraŭ ĉio'"? Jes, malgraŭ siberiaj distancoj, neĝego, emo sidi hejme kaj spektaĉi TV, eĉ certagrada E-malvigliĝo kaj aliaj – "ho, mi ne havas tempon (kio estas latenta "mi ne volas")", tamen venis krasnojarskanoj, tomskanoj, eĉ unu uralanino, kaj du eksterlan-



danoj levis nivelon de la renkontiĝo ĝis “Internacia”!



La naturo donacis por la tuta periodo belegan veteron: de -8 ĝis +0, la ĉeforganizanto Katerina Arbekova aranĝis decajn vivkondiĉojn, varian ripozan programon kaj oportunan ejon kie pasis programeroj. Estis promenoj laŭ nokta festa urbo, ekskursoj – jen en la muzeo de vaporlokomotivoj, jen al la fama novosibirska Akademia urbeto, jen ni trinkis indiĝenajn teojn en etnoparko “Teritorio de Siberio”, dum aliaj skiis en la pitoreska parko Zajelcovkij. Certe oni laborigis la langon por Esperanta idiomo jen dum serioza diskutrondo, kiun gvidis Rafael Mateos, jen dum streĉa kaj gaja ludo “Ĉapelo”, diversaj programeroj aŭ simple dum privataj amikaj babiloj. Ho ve, ne ĉiujn proponojn por la programo ni sikcesis efektivigi, sed ĉu ni venis por streĉe labori aŭ simple por bone ripozi?

Malgraŭ ĉio, la tradicio de E-renkontiĝoj en Siberio ne estingiĝas! Koran dankon al E-entuziasmuloj kaj ĉi-foje al Katerina Arbekova!

Geĉjo Basov (Tomsk/Stavropolj)

NOVTIPA ZAMENHOF-TAGO EN MOSKVO:

Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof



La nova publika MASI-aranĝo – Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof – sukcese pasis la 18-an de decembro 2016 en la moskva kinejo “Kosmos”. Klaras, ke la festo estis atribuita al la Zamenhof-Tago, vaste celebrata en Esperantujo, kaj ĉiu esperantisto scias, ke tio estas

ankaŭ la Tago de Esperanta literaturo, aŭ Tago de Libro. Sed neniu ekster la esperantista mondeto havas tiun scion.

Mi ne diru pri la tuta mondo, eĉ ne pri la tuta Rusio (eble, mi hazarde ion preterlasis), sed en Moskvo minimume dum duonjarcento neniam okazis iu evento honore al Zamenhof por urbanoj. Sed ĉu povas ekzisti pli taŭga informa preteksto? Tamen kiel allogi eksteran publikon al priesperantaj aranĝoj? Devus esti kroma allogaĵo... Kaj por tio konvenis la sperto de Moskva Esperanto-Asocio (MEA MASI) popularigi Esperanton dum la tre amasaj Moskvaj Lingvaj Festivaloj. Dum 10 jaroj ni lernis malferme montri al la eksteruloj nin mem kaj nian idearon. Ni iĝis konvene harditaj. Kial ne fari la sekvan paŝon? Jam temp' está!

La novan eventon ni nomis iom nekutime por la rusa orelo: "Festo de libroj en diversaj lingvoj". Kial ne "... en fremdaj..."? Ĉar, unue, Esperanto ne estas fremda (=eksterlanda) lingvo. Due, lingvoj de multaj rusiaj popoloj estas por ili malfremdaj, sed plej ofte nur malmulte sciataj, aŭ nur lernataj, aŭ eĉ lernotaj. Kaj ni deziris liveri la spacon de nia festo ne nur al fremdaj lingvoj, sed ankaŭ al tiuj malfremdaj kaj, certe, al Esperanto.

La plena nomo de la evento estas "Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof". Kio estas tiu Zamenhof, kial je lia nomo? Ĉar estas li, kiu iniciatis la neŭtralan lingvon, al kiu estas tradukita preskaŭ la tuta klasika mondliteraturo kaj ankaŭ la nuntempa tradukiĝas ĉiutage. Do, Esperanta literaturo prezentas al la leganto literaturon, originale verkitan en diversaj lingvoj. Tial la festo de libroj en diversaj lingvoj havas firman bazon por porti la nomon de Ludoviko Zamenhof, des pli, ke



ni okazigas la eventon en la Zamenhof-Tago kaj en la Tago de Libro en Esperantujo.

Kaj nun, karaj samideanoj, konsciu, ke tiun ĉi klarigon, kiun, plej verŝajne, tute ne bezonas vi, ricevas ĉiuj, invititaj al la evento, ĉiu homo, kiu, eble, antaŭe neniam eĉ aŭdis la vortojn "Zamenhof" kaj "Esperanto". Tiuj homoj tuj ricevas iom da novaj informoj pri la esenco de Esperanto. Ne gravas, ke, probable, ili decidas veni ne por ekscii pli multe pri Esperanto, sed ĉar ili interesiĝas pri libroj en iuj lingvoj. Veninte, ili neeviteble aŭdas novajn klarigojn, vidas surmurajn afiŝojn pri la Zamenhof-Tago kaj sub la verda standardo – la libre plej riĉan tablon kun Esperanta literaturo, ili aŭdas Esperantan paroladon, ĉar duono el la ĉeestantoj estas esperantistoj. Ĉiuj rajtas elekti: tuj lerni legi en Esperanto, aŭskulti rakontojn pri Esperantaj literaturaĵoj en la Rondo de Legado, gajni esperantlingvan libron dum kvizoj kaj partopreni etan Esperantan teatraĵon, ili vidas amikemon de Esperanto-mondo al la mondoj de alilingvaj literaturoj kaj reciprokan amikemon de aliaj literaturoj al Esperanto. Kaj fine de la aranĝo kelkaj diras: "Esperanto ekinteresis min, mi eĉ ekdeziris ĝin lerni".

Nu jen, la esencon mi diris. Restis raporti pri kelkaj konkretaĵoj. La Festo daŭris ses horojn. En la sama sufiĉe vasta spaco paralele laboris kelkaj teritorioj kun siaj programoj. Sur la Podio seninterrompe dum po 30 minutoj okazis prelegoj (du – pri evoluo de Zamenhofa idearo kaj pri Esperanta biblioteko – estis prezentitaj de la E-akademiano Nikolao Gudskov), kvizoj kaj deklamadoj en diversaj lingvoj. Ĉe la tablo "Rondo de legado" post ĉiuj 15 minutoj ŝanĝis unu la alian rakontantoj pri libroj, legitaj en diversaj lingvoj. Konstante laboris temaj libraj tabloj: Tablo pri Esperanto, Tablo pri libroj en la slavaj lingvoj, Tablo pri tekstoj en sanskrito, Tablo pri libroj en la maria lingvo, Tablo pri tradukarto, Tablo pri rapida instruado de legado por infanoj kaj plenkreskuloj, Tablo kun ekspozicio de libroj en diversaj lingvoj. La aranĝon partoprenis ĉ. 50 personoj, preskaŭ ĉiuj venis de la Moskvaj lingvaj festivaloj. La tutan aranĝon organizis tri MASI-anoj (kaj mi speciale dankas al Sofja Zareckaja kaj Maksim Silantjev), la programojn gvidis 8 homoj kun ioma helpo de kroma deko. La etoso estis tre malstreĉa kaj hejmeca, por ĉiu programero sufiĉis gastoj, ĉiuj gvidantoj sukcesis realigi ĉion, kio estis planita, kaj esprimis firman deziron partopreni la samtipan eventon en la sekva jaro. Ankaŭ la publiko aspektis interesita kaj kontenta.

Do, estas ĉiuj premisoj, ke la festo transformiĝu al festivalo, kun pli varia programo, pli da partoprenontoj kaj gastoj. Lige kun tio ni havas multe da interesaj ideoj; sed pri tiuj – en la sekvaj artikoloj.

Irina Gonĉarova, kunordiganto de MEA MASI, Iniciatinto de la Festo

BULTENO de REU

№ 88, Februaro 2017



RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ 2017

DUA INFORMILO

Dato: la 2-a – 9-a de aŭgusto 2017
Loko: Jaroslavla provinco, u. Poŝeĥonjo, str. Zagorodnaja, 7, bazejo de ripozo kaj turismo "Ĉudnój Dvor " ("Strangula Korto").
Kondiĉoj kaj prezoj por loĝado:

Hotelo

a) Baza prezo por unuloka lito = 980 rbl / persono / diurne.
b) Ekstra prezo = 850 rbl / persono / diurne, kondiĉe, se oni dormos en 2-loka lito duope.
c) Divanlito = 650 rbl / persono / diurne.
ĉ) Familia 2-loka lito por paro = 1120 rbl / persono / diurne.

Ĉiuj ĉambroj enhavas necesejon, duŝon. Oni liveras po 3 viŝtukoj kaj pantoflojn.

Lignaj domoj (ĉiuj prezoj – por persono diurne)

Domo numero 1:	**Domo numero 2:**	**Domo numero 3:**
Unuloka lito = 990 rbl. Duloka = 860 rbl. Divanlito = 750 rbl.	Unuloka lito = 1350 rbl. Duloka lito = 1100 rbl. Divanlito = 750 rbl.	Duloka lito = 1000 rbl. Divanlito = 750 rbl.

En la domo numero 2 estas saŭno

En ĉiu domo estas necesejoj, duŝoj, malsupre granda manĝ-areo kun foteloj, divanoj, granda tablo. *Endas konsideri, ke kun pli da loĝantoj en ĉiu ĉambro prezoj malgrandiĝas. Do, pensu, elektu, grupiĝu!*

Amasejo kun propraj dormosakoj kostas 139 rbl / persono / diurno.

Tendumado. Unu tendoloko depende de la tendograndeco kostas ekde 270 rbl / diurne.

Manĝado

Estos organizota en la bazeja restoracio. Kaze de favora vetero oni servos ekstere sub la grandega tegmento. 3-foja ĉiutaga manĝado = 770 rbl.

Memstara kuirado sur la teritorio de la bazejo estas malpermesata!

Provizora programo

Konferenco de REU. "Lego-Tago" omaĝe al la 140-jara jubileo de I.Ŝirjaev kun riĉa programo. Somera Universitato. Atelieroj: lingva, literatura, kanta, instruista, traduka. Aktivula trejnado. Koncertoj, kvizoj, ludoj, konkursoj. Sportumado. Libroservo. Lignofajroj.

Pri ekskursoj, trafiko, renkonto-akompano la informo sekvos.

Por interesiĝantoj antaŭ RET estas proponata speciala religia programo "Ortodoksa kunumado" inter la 27.07 – 01.08 kun vizitoj de preĝejoj, diservoj en kelkaj urboj, partopreno en festa kruca procesio en u. Tutajev laŭ la bordo de Volgo. La detalan informon bonvolu peti ĉe pastro-monaĥo Taŭriono:< ilija@yandex.ru>.

Bonvolu antaŭpagi la loĝadon 50 % de la elektota varianto al la kasisto de REU ĝis la 25-a de aprilo. Dankon!

BONVENON AL LA MISTERA POŜEĤONJO!!!

Burokrata forpuŝo

Jen kun kiu letero ni turnis nin okaze de la okazonta ĉi-jare en Soĉi Tutmonda Junulara Festivalo:

В национальный подготовительный Комитет
XIX Всемирного Фестиваля молодежи и студентов

Уважаемые господа, дорогие друзья!
Всемирная эсперанто-ассоциация (УЭА) и ее молодежная секция (ТЭЙО) , представляющая движение эсперантистов в более чем 120 странах, в том числе и в России, и имеющая консультативный статус при ООН и ЮНЕСКО, с неподдельным интересом следят за подготовкой к проведению XIX Всемирного Фестиваля молодежи и студентов. Мы высоко ценим фестивальное движение и с удовлетворением восприняли решение о проведении мероприятия мирового масштаба в 2017 году в России. 60 лет назад в Москве проходил VI Всемирный Фестиваль молодежи и студентов, в котором приняли участие также молодые эсперантисты из разных стран. Участие советских эсперантистов в то время практически возродило эсперанто-движение в нашей стране.
УЭА , коллективным членом которой является и наша российская организация эсперантистов, выступает за равноправное, справедливое решение проблем в сфере языковой и межкультурной коммуникации, за сохранение культурного многообразия и непосредственный диалог народов разных стран и континентов. Эти же цели имеет и фестивальное движение.
Эффективным решением проблемы межнационального общения является язык эсперанто. Зародившийся в Российской империи 130 лет назад, он политически нейтрален, имеет миллионы адептов во всем мире, признан авторитетными международными организациями (включая ЮНЕСКО). В совершенстве овладеть эсперанто можно в течение одного года. Начальный курс занимает около двух месяцев.
Молодежная организация ТЭЙО ежегодно проводит международные встречи в различных странах, где молодежь общается на одном нейтральном языке. Мы осмеливаемся предложить подготовительному Комитету использовать прекрасную возможность, включив использование эсперанто в программу Фестиваля, как одного из методов общения в современном мире.
Наша организация готова содействовать в участии в Фестивале эсперантистов из разных стран, сотрудничать в осуществлении различных программ (встречи, презентации, доклады, концерты, дискуссии, выставки и др.), а также осуществить перевод основных документов Фестиваля на эсперанто.
С пожеланиями успехов

Президент РоСЭ С. Сметанина

Kaj jen kion ni ricevis responde:

Добрый день!
Благодарим Вас за высокую оценку значимости Фестиваля и проявленный интерес к главному событию 2017 года в России в сфере молодёжной политики.
Выражая признательность за работу с талантливой молодежью в рамках реализации приоритетных направлений государственной политики в сфере культуры, отмечаем, что высоко ценим значительный вклад в вовлечение молодежи в активную культурно-социальную и общественную жизнь страны.
Ваши предложения будут учтены при формировании проекта культурной программы Фестиваля. Дополнительную информацию можно получить у координатора культурной программы Фестиваля – Исмаковой Анастасии Евгеньевны, электронная почта: <a.ismakova@russia2017.com>.

Skriba KER-sesio en Moskvo ĉi-jare



Skriba KER-sesio ĉi-jare en Moskvo okazos la 10-an de junio. La skriba ekzameno laŭ internaciaj postuloj de Komuna Eŭropa Referenckadro estas organizata en Moskvo jam dum kelkaj jaroj. Laŭ la kvanto de ekzamenitoj Moskvo estas en la tria loko inter 70 landoj kun ĝis nun 134 sukcesintoj.
Eble ni povus veni al la dua loko, se niaj esperantistoj, aktivuloj kaj novuloj pli aktive kaj serioze rilatus al ĉi tiu ekzameno. La ekzameno pritaksas la nivelon de tri bazaj lingvokapabloj: bazan, mezan kaj superan. Tiuj niveloj konformas al la priskriboj de KER je B1, B2 kaj C1. Krome, oni ricevas ateston pri la ekzameno en 4 lingvoj.
Limdato por registro al la skriba sesio en Moskvo estas la 1-a de majo 2017. Kun petoj, demandoj bonvolu turni vin al la ĉeforganizanto de la KER-sesio, reprezentanto de ILEI en Rusio Svetlana Smetanina. Bonvenon!

NI VIVU LONGE, FELIĈE KAJ FELIĈIGE, NI ĜUU NIAN ESPERANTISTECON KAJ NIAN MALFERMITECON AL LA MONDO!

INTERVJUO DE BORIS KOLKER POR FORMOZA FOLIO



– Ĉu vi povus prezenti vin?
= Mia nomo estas Boris Kolker. Mia kromnomo estas Ĉiĉerono en Esperanto-lando.
– Kiun profeson vi havas?
= Pliparton de mia vivo mi laboris kiel tradukisto de scienca kaj teknika literaturo, ĉefe pri naftoindustrio. Antaŭ tio mi instruis la lingvosciencon, la francan kaj latinan lingvojn en universitatoj. La lastan jardekon, post la elmigro en Usonon el Rusio, mi laboris kiel oficej-estro en komputila kompanio.
– Kiam vi estis knabo, kiu estis via ambicio por via plenaĝa vivo?
= Mi revis fariĝi ĵurnalisto.
– Kio estas via plej forta memoro pri infaneco?
= Estis oktobro de la 1944-a jaro. La 2-a Mondmilito ankoraŭ daŭris. Ni revenis el Uzbekio en la liberigitan urbon Kiŝinevo (Moldavio, Sovet-Unio). Malfrua vespero. Neniu lumo en stratoj, laŭlonge de kiuj staras ruinoj de bomb-detruitaj domoj. Mi estas 5-jaraĝa.
– Kio estis la unua libro, kiun vi legis en Esperanto?
= "*Petro*". Eldonejo SAT. Parizo. 1956 (8-a eldono). Internacia lernolibro por laboristoj. Plene en Esperanto.
– Kio estas via plej ŝatata libro?
= "*Kredu min, sinjorino!*" de Cezaro Rossetti.
– Kiu estas la libro, kiun, laŭ vi, ĉiuj esperantistoj bezonas legi?
= Ĉu estas iu dubo? Certe, "*Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*"! Ĝia tralego egalas al tralego de biblioteko.
– Kiam kaj kiel vi komencis verki?
= En aŭgusto 1960, dum la 2-a Balta Esperanto-tendaro en Estonio Vytautas Šilas kaj mi tradukis el la rusa en Esperanton la tekston de tiam ege populara kanto "*Indonezio*".
– Kiel venis al vi la ideo verki lernolibrojn de Esperanto?
= En februaro 1970 mi lanĉis mian amasan korespondan kurson de Esperanto, en kiu dum 23 jaroj diplomiĝis preskaŭ 900 personoj el ĉiuj regionoj de Sovet-Unio. Ĉar dum dudeko da

jaroj Esperanto estis malpermesita en Sovet-Unio, mankis lernolibroj por ruslingvanoj. Tial dum du jaroj mi uzis por tiu kurso la supremenciitan lernolibron "*Petro*". Ĉar mi laboris kiel interpretisto-tradukisto kun teknikistoj de la franca aŭtomobila kompanio "*Renauld*", kiu konstruis motor-uzinon en nia urbo Ufa, mi sukcesis havigi al mi latinliteran tajpilon (nekredebla maloftaĵo tiutempe!). Mi retajpadis la lecionojn kaj sendadis ilin al miaj lernantoj. Fine mi decidis mem verki lernolibron – ja laŭdiplome mi estis instruisto de lingvoj. Mi faris tion en la 1972-a jaro kaj sekvajare mi sukcesis publikigi la lecionojn en la regiona junulara ĵurnalo. Dum pli ol 40 jaroj tiu lernolibro estis perfektigata kaj reeldonata kaj nun estas konata kiel Plena lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj.
– Ĉu vi havas kontakton kun viaj legantoj?
= Jes, mi estas en kontakto kun centoj da miaj lernintoj kaj legantoj.
– Iuj aŭtoroj havas ĉiam oportunan kajeron, en kiun ili notas ideojn kaj frazojn, kiuj trairas iliajn kapojn. Iuj skribas sur papero unue kaj nur poste tajpas la tekston. Kaj vi, ĉu vi havas skribo-ceremoniaron?
= Iam mi skribis notojn sur paperon. Jam delonge mi tajpas ilin en mian komputilon. Tial, kiam venas tempo por prepari novan eldonon de iu mia lernolibro, mi jam havas listegon kun eventualaj modifoj.
– Ĉu vi pensas ke skrib-talento venas el disciplino aŭ el naturo? (Do you think that writing talent is nurture or nature?)
= Verŝajne, el ambaŭ.
– Kio estus via unua konsilo por iu, kiu dezirus esti verkisto?
= Rememoru iun tre interesan epizodon en via vivo, priskribu ĝin kaj konigu al viaj amikoj.
– En "*Vojaĝo en Esperanto-lando*" oni povas legi tekstojn de multaj gravaj Esperanto-verkistoj. Ĉu vi renkontis multajn el ili?
= Jenajn aŭtorojn de tekstoj mi renkontis: William Auld, Gaston Waringhien, Claude Piron, Marjorie Boulton, Tibor Sekelj, Eŭgeno Bokarjov, John Wells, Trevor Steele, Hilda Dresen, Louis Beaucaire, Humphrey Tonkin, Spomenka Štimec, István Nemere, Julian Modest, Vladimiro Samodaj, Nadija Andrianova, Mikaelo Giŝpling, Mikaelo Bronŝtejn, Arthur Baur, Nikola Aleksiev, Den Drown, Sergej Kuznecov, Nina Cvileneva. Legado de iliaj verkoj kaj komunikiĝo kun ili (persona kaj koresponda) riĉigis mian vivon.
– Vi verkis kelkajn famajn Esperantajn lernolibrojn por studantoj de malsamaj niveloj. Ĉu vi foje pensas pri verki romanon, fikcion, verkon de teatro?
= Mi pensis verki tre originalan libron pri Ludoviko Zamenhof kaj kolektis ideojn kaj materialojn pri tio. Sed mi ne trovis tempon. Kaj nun jam estas malfrue okupiĝi pri tio.
– Vi estas membro de la Akademio de Esperanto; kion ĝi reprezentas por vi?
= Mi estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en la 1992-a jaro kaj reelektita por du pliaj 9-jaraj periodoj. Mi kunlaboras en jenaj sekcioj: Ĝenerala Vortaro, Kontrolado de lerniloj kaj Lingva Konsultejo; la lastan mi gvidis dum 3 jaroj. La Akademia laboro ne estas tre rimarkebla ekstere, sed grava por la evoluo de Esperanto. Mi enmetas en ĝin mian kompetentecon.
– Vi ankaŭ estas membro de la Akademio Literatura de Esperanto (ALE); ĉu vi povas diri al ni kelkajn vortojn pri la celo de ALE?
= Ĝi estis fondita en la jaro 1983. Ĝia celo estis stimuli kaj plialtniveligi la esperantlingvajn verkadon kaj kritikarton, kaj agnoskigi la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperanto-movado. Ŝajnas al mi, ke en la lastaj jaroj ALE estas malpli aktiva.
– Vi verkis doktorigan disertacion pri "*Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto*". Ĉu vi pensas, ke kelkaj kulturoj aŭ lingvoj havis ŝlosilan rolon en la apero kaj evoluo de Esperanto?
= Mi povas respondi la demandon pri la apero de Esperanto. Ĝia leksiko estas bazita sur internaciaj elementoj de jenaj gravaj eŭropaj lingvoj laŭ jena ordo: franca, angla, germana kaj rusa. En la formiĝo de Esperanto la rusa lingvo ludis la rolon de la decida kontrola lingvo: en Esperanton eniris unuavice tiuj eŭropismoj, kiuj iĝis elementoj de la rusa lingvo kaj plej ofte en la formo, kiun ili akiris en la rusa lingvo. Al la evoluo de Esperanto influis unuavice kulturoj kaj lingvoj de elstaraj Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj. La unua periodo estis la

rusa, unuavice danke al tio, ke Ludoviko Zamenhof kaj unuaj verkistoj loĝis en la Rusia imperio. Ege grava estis la franca periodo.

– En "*Vojaĝo en Esperanto-lando*" oni povas legi pri la diktatora regado de Stalin. Ĉu vi pensas, ke junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kion homoj kiel Hitler, Stalin kaj probable diktatoroj en aliaj landoj faris al esperantistoj?

= Verŝajne, junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kvankam estas facile alirebla la brila libro de Ulrich Lins "*La danĝera lingvo*". Tamen pli gravas ne la historio, sed la realo: diskonigo, lernado kaj diversspeca utiligo de Esperanto.

– Vi estis kunfondinto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kaj kunlaboris al multaj gravaj projektoj kaj agadoj. Ĉu vi pensas iam verki biografion, kie vi rakontus al ni pri ĉi tiuj spertoj?

= Mia amiko Vladimir Samodaj verkis tiaspecan libron sub la titolo "*Esperanto kaj vivo*", por kiu mi verkis antaŭparolon. Estus alloge, se ankaŭ mi rakontus pri mia vivo libroforme. Sed ŝajnas, ke mia malpliiĝinta energio ne sufiĉos por tiu laboro. Tamen iujn interesajn epizodojn el mia vivo mi rakontis en kelkaj publikigitaj rakontoj kaj intervjuoj.

– Ĵak le Puil kantas "*Kiam regos am' sur ter'*", traduko de "*Quand les hommes vivront d'amour*", kanto de Raymond Lévesque el Kanado. Li diras: "Kiam regos amo sur tero, Trobadoriĝos la soldato; for la militon, for la karceron! Sed ni jam estos mortaj, frato!". Ĉu vi pensas, ke iam amo aŭ paco regos sur tero? Ĉu vi pensas, ke venos la fina venko?

= La amo kaj la paco, kaj ankaŭ la fina venko de Esperanto vivu unuavice en nia koro! Ni vivu longe, feliĉe kaj feliĉige, ni ĝuu nian esperantistecon kaj nian malfermitecon al la mondo!

Boris Kolker, civitano de Esperanto-lando (**Formoza Folio, N-ro 19)**

Oni pri ni

"Vesĉernjaja Moskva" ("Vespera Moskvo") Pri Esperanto

En unu el la plej popularaj kaj legataj urbaj ĵurnaloj de Moskvo aperis tre bona artikolo pri Esperanto-kurso de Irina Gonĉarova "Faru la rondon!" La artikolo estas pozitiva, evidentas simpatia rilato de la aŭtoro (Maria Rajevskaja) al la kursgvidantino kaj ideo de Esperanto. La artikolo legeblas ĉe <http://vm.ru/news/2017/01/10/esperanto-zamechatelen-tem-chto-pered-nim-vse-ravni-346050.html>.

Informoj kaj raportoj

Raporto pri la regiona agado de REU en 2016

La plej aktiva regiona E-agado en Rusio:

1. En la azia parto de Rusio pli aktivis esperantistoj de Novosibirska, Krasnojarska, Tomska, Jekaterinburga kaj Krasnodara (la urbo Soĉi) regionoj. Plej aktive agadis Novosibirska Esperanto-Klubo kaj ĝia prezidantino Katerina Arbekova.
2. En la eŭropa parto de Rusio pli aktivis esperantistoj de Krimea Respubliko, Tatario, Moskva regiono, la federacia urbo Moskvo.
3. Bedaŭrinde, kelkaj personoj el Sankt-Peterburgo aktivis kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ esperantistoj kaj favore al la angla lingvo – tio okazas en la grupo "Esperanto": <https://vk.com/priesperanto>. Plej misaktivas tiurilate Konstantin Olŝin kaj Boris Zelenov, kiuj dum jaroj spamigas la grupon per provokaj diskutoj kun propagando. Mi opinias, ke peterburgaj esperantistoj devus iel influi tiajn personojn – almenaŭ per plifortigo de pozitivaj agoj.

Ankaŭ en multaj aliaj regionoj esperantistoj aktive agadis, sed mankas detalaj informoj pri iliaj agadoj.

Ankaŭ nemembroj de REU aktive agadis en iuj rusiaj regionoj. Ekzemple, la teamo de "La Ondo de Esperanto" aktive agadis en Kaliningrada regiono.

REU-komisiito pri la regiona agado kaj pri la rilatoj kun KAEM
Vladimir Minin

La januara *Ondo* senpage legebla

La 30-an de decembro 2016 en la elŝutejo de "La Ondo de Esperanto" aperis la januara numero de ĉi tiu revuo, kiu nun ne plu aperas papere, sed estas eldonata kiel bitgazeto (elektronika gazeto) laŭ la popularaj normoj "pdf" kaj "ePub". Dum la posta semajno la abonantoj jam elŝutis la januaran "Ondon" aŭ ricevis ĝin perpoŝte, kaj la redakcio de "La Ondo de Esperanto" sojle de la orient-kristana Kristnasko disponigis ĝin senpage, por ke ĉiu dezíranto povu legi ĝin kaj decidi pri (ne)abono.

La 65-paĝa kolorplena januara "Ondo" (2017) estas nun libere elŝutebla en la kiosko de "Sezonoj": <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>.

"La Ondo de Esperanto" (11 numeroj + literatura suplemento) estas abonebla kontraŭ nur 15 eŭroj ĉe niaj perantoj, UEA-konto, kaj per PayPal/bankkartoj. La loĝantoj de Ruslando kaj Belarusio povas aboni kontraŭ nur 750 rusiaj rubloj.

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Peĉjo admirigas (Informcele publikigita en Google+)

Dum du lingvofestivaloj en Rusio estis la 12-jara Petro Fedosov, la plej juna lingvoprezentanto tra la historio de MLF kaj eble eĉ tra la 20-jara historio de ĉiuj lingvaj festivaloj en la mondo. Fluparolanta esperantisto-aŭtodidakto ekde la fino de la pasinta jaro, Peĉjo prezentis Esperanton, kaj faris tion kun nekredebla majstreco. Admirojn kaj gratulojn li meritas! Tial prezento lia sur jutuba kanalo bonvenintus...

Herman Deceuninck, Belgio

Nia kulturo

Ni daŭrigu nian poezian konkurson!

La ĵurio en la konsisto de Nikolao Gudskov, Valentin Melnikov kaj Svetlana Smetanina pritaksis la versaĵojn, venintajn al la konkurso. Estis proponite traduki rusen la poemon de **Julio Baghy "Aŭtuna foliaro"**. La unuan lokon okupis la traduko de Mikaelo Bronŝtejn, kiun li faris en la jaro 1975 kaj prezentis en Leningrado. Ĝin laŭdis mem sinjoro Etkind. Jen la teksto:

Листья в час осенних плясок –
Сто оттенков, сотни красок.
Их, горящих в неге синей,
Гонит ветер, студит иней.
Здесь – один, а дальше – стаей
Погружаются, взлетают,
И несётся шорох, шёпот,
Жёлтых жалоб скорбный ропот
После сильного порыва
Так бесцельно и тоскливо!
Замедляется движенье –
Собираются в круженье
Лечь остывшими телами
Под печальными стволами.

La duan lokon meritis Ludmila Novikova, la trian Lubovj Karpeta (Vladivostok, E-klubo "Pacifiko"). Gratulojn al la partoprantojn kaj novajn sukcesojn!

Por la sekva etapo ni proponas la versaĵon de **Eŭgeno Miĥalski**, kies 120-jara datreveno estis ĉi-januare. La titolo estas "**Kristaloj de neĝo, facetoj glaciaj…**", publikigita en la libro "Kantoj de amo kaj sopiro" (1934):

Kristaloj de neĝo, facetoj glaciaj
Kaj varma altuŝo de ŝia manet' –
Jen estas la tempo por belfantazio
De juna flamema, amanta poet'!

Kupolo ĉiela kun brila stelĥoro,
Rapida flugkuro de glitveturil',
Konfeso subita pri sento de l'koro
Sub lula kareso de la sonoril'!

Kaj ŝajna konfuzo de la junulino,
Persista konvinko kun kisakompan',
Subita neĝfloka ŝutiĝ' de sur pino,
Kaj ruza ridet' de l' okulo-cejan'!

Bruet' veturila sur neĝo krakanta,
Kaj ronk' de ĉevaloj, jam lacaj pro kur' –
Jen estas inspiro por juna amanto
De liaj konfesoj, promesoj kaj ĵur'!

Bonvolu pli aktive partopreni kaj sendi viajn kreaĵojn al la redakcio de la Bulteno.



Novaj libroj

Libro pri Konstantin Gusev

La ruslingva libro estas dediĉita al la 100-jara jubileo de la fama poeto-esperantisto Konstantin Gusev. Lia filo kompilis multajn faktojn el la vivo de sia patro. La lingvaĵo estas interesa, simpla. La enhavo estas atentokapta. Eldonis la libron la eldonejo "Impeto". La libron eblas aĉeti ĉi tie <http//:lernolibro.ru>. Agrablan legadon!

In memoriam



Forpasis Vladimir Bespalov

La 2-an de februaro, nokte dumdorme, subite mortis Vladimir Ivanoviĉ Bespalov. Li naskiĝis la 21-an de januaro 1940 en Siberio, en Tisula distrikto de Kemerova provinco, en 1963 translokiĝis al Soĉi kaj tie tuj eklernis Esperanton ĉe Tatjana Kulakova (avino de I. Gonĉarova). Kune kun ŝi li baldaŭ fondis la lokan klubon "Laro", kiun post la forveturo de Kulakova el Soĉi en 1974 li gvidis dum jardekoj. Laŭ la diplomo de Taganroga Pedagogia Instituto (1976) li estas

instruisto de la germana lingvo, sed laboris ne nur kiel instruisto, sed en tute diversaj lokoj, i.a. en fabriko de glaciaĵoj. Vladimir senĉese instruadis Esperanton (ankaŭ al siaj infanoj, kiuj fariĝis denaskaj esperantistoj), organizis kaj kunorganizis aron de regionaj kaj landaj aranĝoj, tendaroj, renkontiĝoj – i.a., Rusian Esperanto-Kongreson en 1993. Li estis unu el la unuaj aktivuloj de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado, 1966-1979), kaj senlace agis en Esperantujo dum duonjarcento. Estrarano de SEJM, de ASE (1979-1989), de SEU (1990-1991) kaj de REU (1991-2011 kun paŭzoj). Ĉiam konvinkita komunisto, li estis unu el gravaj aktivuloj de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo) kaj membro de SAT; partoprenis en kelkaj SAT-kongresoj – la lastajn fojojn li kontribuis SAT-kongresajn programojn en Jalto en 2012 kaj en Madrido en 2014. Ekde 2005 ĝis 2016 li organizis ĉiujare (krom 2008) en Soĉi 10 malfruaŭtunajn renkontiĝojn TILE (Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto) – la lastan je malpli ol 3 monatoj antaŭ la forpaso… Liaj ĉarma rideto kaj ĉiama humuro estas konataj al ĉiuj.
Sincerajn kondolencojn al la familianoj, klubanoj, amikoj...
Ni ne forgesos vin, kara Volodja!
Helan memoron!

Svetlana Smetanina, Nikolao Gudskov

Ŝajnas al mi, ke mi estis konata kun esperantisto Vladimir Bespalov dum mia tuta vivo. Ja mi renkontiĝadis kun li praktike ĉiujare (kaj pli ol unufoje jare). Li estis tre laborema kaj laborkapabla. Li ĉiam laboris minimume en 2 lokoj kaj krom tio multe por Esperanto kaj por disvastigo de komunismaj ideoj ĝis sia 77-jara aĝo. Li estis la plej honesta el ĉiuj komunistoj, kiujn mi konis. Se ĉiuj homoj laborus, kiel li, la komunismo jam venkus antaŭ multaj jaroj. Li laboradis ankaŭ por Esperanto ne por profito, sed por efektivigi ĝiajn noblajn idealojn.
La lastan fojon mi renkontiĝis kun li dum TILE en Soĉi (Rusio) la 28-an de oktobro – la 7-an de novembro 2016. Ĝuste li (la unua inter la esperantistoj) eksciis, ke en oktobro 2017 okazos la 19-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj (TFJS)en Soĉi. Kaj ni jam komencis plani eventualan partoprenon de esperantistoj en la 19-a TFJS. Ni ankaŭ planis inviti la 9-an Azian Kongreson de Esperanto al Soĉi por oktobro de la jaro 2019.
La lastan fojon mi vidis lin kaj parolis kun li la 7-a de novembro apud la monumento de Lenin en Soĉi. En tiu dato ĉiuj komunistoj de la urbo kolektiĝas tie ĉiujare. Li rakontis pri siaj planoj festi la 100-jaran jubileon de Granda Oktobra Socialisma Revolucio en la sama loko post unu jaro la 7-an de novembro 2017 kaj pri planoj de komunistoj okaze de tiu ĉi datreveno. Sed lia koro ne povis plu funkcii por tiom ege streĉa vivo kaj paneis tute eluzita la 2-an de februaro 2017, kiam li estis 77-jara kaj 12-taga sume. Ege bedaŭrinde. Nia vivo iĝis malpli senc-enhava sen li.
Funebrante kaj kondolencante al liaj proksimuloj (parencoj kaj e-istoj),

Vladimir Minin

Mia samurba frato... La verva nigrohara junulo maldikega – ofta gasto de nia hejmo, kune kun mia avinjo kreanta la E-klubon en Soĉi, la homo, kiu gvidis min al mia plej unua en la vivo E-tendaro – en Litovion.
Kara Volodja! Dankon! Mi estas la homo, kiu vere neniam forgesis kaj neniam forgesos vin!

Irina Gonĉarova

Estas malfacile kredi, ke tio okazis.
Vladimir Bespalov lernis Esperanton en la 1963-a jaro, estis unu el la unuaj aktivuloj de SEJM kaj senlace agis en Esperantujo dum duonjarcento.
Li mankos al ni ege!

Boris Kolker

Februare foriras amikoj –
stranga fato.
Sen ajna kompato
ripetiĝas subita ekbato.
Vanas ŝrikoj.

Kaj imagu, jam marto proksimis –
tagoj sunaj,
kaj vi estas junaj!
Kial por vi la nadloj fortunaj
haste "sorton" kaj "morton" enrimis?

Kial la rabobirdo Destino
murde bekas
vin, vin, kiuj vekas
nin por vivi, vin, kiuj amegas
vivohelon sen fino?!

Februare vintreg' manifestas
frostan forton,
fatalon, formorton,
senesperan minoran agordon,
tamen restas

la espero pri l' marta rekreo,
l' vortoj veraj
de viaj sinceraj
kaj feliĉaj poemoj surteraj
por plu vivi sen veo.

Mikaelo Bronŝtejn

Decidoj de Estraro de REU 14.02.2017

1. Okazigi Konferencon de Rusia Esperantista Unio dum RET en Poŝeĥonjo en la periodo inter la 3-a kaj la 8-a de aŭgusto 2017.
2. Pro konstanta malhonesta konduto kaj publikaj ofendoj rilate estraranojn kaj aktivularon de REU, misuzo de dissendo-listoj kaj sociaj retoj la estraraneco de Valentin Viktorovich ***Melnikov*** estas suspendata ĝis ricevo de oficiala pardonpeto. Se tiu pardonpeto ne aperos ĝis la fino de februaro 2017, V.V. Melnikov estos definitive eksigota el la membroj de REU-Estraro.

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov <nikolao@yandex.ru> aŭ (kaj) Svetlana Smetanina <svsmetanina@yandex.ru>.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 16.02.2017

Eksciu, ke...

NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO “ESPERANTO”

Unuafoje en la historio de la revuo Esperanto, ĝi oficiale havos du redaktorojn, la geedzan paron Dima Ŝevĉenko (31) kaj Anna Striganova (29). Tiel decidis la Estraro de UEA, kiu intervjuis ankaŭ du aliajn bonajn kandidatojn por sekvi Attila Kaszás en tiu grava posteno.

Ni estis tre impresitaj de la propono, per kiu Dima kaj Anna kandidatiĝis, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. *Ili kune disponas pri granda gamo de kapabloj, ne nur pri la enhava redaktado, sed ankaŭ pri grafiko kaj enpaĝigo kaj pri la reteja flanko de la revuo. Tiu kombino de fortoj ŝajnas al ni tre promesplena.*

Ambaŭ homoj laboras partatempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Interpopola Amikeco en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo kaj jam preparas kandidatajn disertaciojn por defendo. Ĉe Dima, denaska esperantisto, la diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto kaj ĝia loko en la mondo de amaskomunikiloj. Interreto grave rolas en ilia nuna agado, ĉu en praktika laboro pri la retejo de la filologia fakultato, ĉu kiel instrutemo kaj esplorobjekto. Kvinjara laboro ĉe la rethotela kompanio “.masterhost” donis al Dima multajn teknikajn konojn sur tiu kampo.



En Esperanto ili estas konataj kiel la gvidantoj de la grava eldonejo “Impeto”, kiun fondis en 1992 la gepatroj de Dima, Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko (kune kun Dmitrij Perevalov). De tiu tempo la eldonejo aperigis pli ol 300 librojn en Esperanto kaj la rusa lingvo. Post la forpasoj de la fondintoj (Aleksandr en 2012, Elena en 2015), Dima kaj Anna sukcese pluportas la torĉon. Per tiu okupo ili lernis multe pri tekstoredaktado kaj enpaĝigo, same kiel pri la interesoj kaj preferoj de la Esperanta libromerkato. Ili estas aktivaj en la moskva Esperanto-movado, kie ili organizis plurajn popularajn aranĝojn. Ili kunlaboras ankaŭ pri instruado de Esperanto en diversaj medioj.

Anna kaj Dima transprenos la revuon ekde la aprila numero 2017. Kune kun la preparado de sia unua numero, ili planas krei *modernan retejon de la revuo, kiu celos interagi kun la abonantoj kaj aŭtoroj,* kiel ili proponis en sia kandidatiĝa letero. Tia *integriĝo de la tradiciaj paperaj eldonaĵoj en la interretan mondon* estas por ili aparte interesa, teorie kaj praktike. Aldonas Fettes: *Tio plene kongruas kun niaj planoj por la evoluigo de UEA. Retaj servoj estas grava parto de nia strategio por kreskigi kaj aktivigi nian membraron, kaj ni vidas kernan rolon por la revuo kaj ĝia retejo. Ni antaŭĝojas kunlabori kun la novaj redaktoroj por realigi tiun vizion.*

Gazetaraj Komunikoj de UEA

AKTIVULO.NET: RETEJO POR AKTIVULOJ KAJ AKTIVEMULOJ

Kiel plia paŝo en la renovigo de la retejoj de UEA, lanĉiĝas nun nova paĝaro: <aktivulo.net>. Frukto de longa laboro de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, laŭ instigo kaj gvido de la Vicprezidanto de UEA Stefan MacGill, la nova retejo celas subteni niajn aktivulojn tutmonde per valoraj informoj kaj kontaktebloj.

Unu el la kernaj celoj de la paĝaro estas provizi kaj enarkivigi informojn pri la Seminarioj por Aktivula Maturigo – agado, kiu jam gajnis por MacGill la honoran titolon *Esperantisto de la Jaro 2016*. Per kolektado de la materialoj kaj rezultoj de la seminarioj UEA celas iom post iom krei ampleksan sciobankon por diversspecaj bezonoj sur la agadkampoj Konsciigo, Kapabligo, Komumuno kaj Kunordigo. Krome la retejo enhavas la rezultojn de strategiaj FLAM-analizoj el diversaj aranĝoj, landaj kaj internaciaj, kaj la kolekton de la Estraraj Komunikoj (EKO-komunikoj) pri la agadoj de UEA en lastaj kelkaj jaroj.

Pri la Jaro de la Lernanto, unu el la du ĉefaj fokusoj de la agado de UEA por 2017, la retejo provizas la uzantojn per ĝisdataj informoj, inkluzive de listo de eventoj kaj konsiloj por lokaj grupoj.

Novaĵo estas Asocia Blogo, kiu celas doni kanalon por rekta informado pri la faroj, spertoj kaj vidpunktoj de diversaj UEA-aktivuloj, inkluzive de oficistoj kaj volontuloj en la Centra Oficejo, estraranoj kaj komisiitoj. La unua blogaĵo estas verkita de Veronika Poór, Ĝenerala Direktoro de UEA, kiu rakontas pri kelkaj spertoj kaj atingoj dum la unua jaro en Roterdamo.

Komence la retejo <aktivulo.net> prizorgas ĉefe unudirektan informodonadon. Perspektive, tamen, la celo estas enkonduki teknikajn rimedojn por ebligi dudirektajn dialogojn kaj faciligi la enplekton de pli vasta gamo de aktivuloj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

LABORU KUNE KUN UEA

La Estraro de UEA klopodante igi la asocion pli demokratia, lanĉas la **Forumon de UEA** – <http://forumo.esperanto.net/>. Ĝi estas la oficiala kunlaborejo de UEA, kie ĉiu esperantisto havos oportunon labori proksime de la Estraro, kaj la Estraro havos oportunon koni novajn agadproponojn.

Por la estraranoj, komisiitoj kaj oficistoj de UEA estas tre malfacile akompani la diskutojn tra pluraj grupoj en la reto, kaj de tio rezultas manko de niaj respondoj kaj agoj.

La forumo ne celas anstataŭi diskutojn de la aliaj grupoj; fakte ni preferas, ke ili daŭre ekzistu, kaj ke la membroj diskutu pri diversaj temoj tie, sed ni provas krei manieron por ke post la maturiĝo de tiuj diskutoj oni afiŝu la konkludon, eĉ kun pluraj vidpunktoj, per resuma maniero en la koncerna rubriko de nia forumo. Tiel ni centros en unu sola loko gravajn informojn, kiuj estos ĉiam facile retroveblaj en ĝiaj kategorioj, rubrikoj kaj subrubrikoj.

En la forumo estos pluraj kategorioj, rubrikoj kaj subrubrikoj, do eblas facile organizi ĝin laŭteme, kaj ĝi funkcios ankaŭ kiel konserva loko, do ni certigos, ke neniu ideo perdiĝos kaj ke ĝi estos facile retrovebla. Cetere ni intencas plusendi la afiŝojn de la nova forumo al la koncerna respondeculo pri la temo diskutata, kio certe rezultigos praktikajn atingojn, aŭ almenaŭ kontentigajn respondojn.

Ni invitas vin viziti la supre menciitan adreson por konatiĝi kun la kunlaborejo. Jam estas kelkaj pretaj rubrikoj, kiuj atendas vian kunlaboron.

Ni sugestas ke vi komencu vian esploron per la kategorio [Legu ĉi tiun instruon unue] <http://forumo.esperanto.net/index.php?board=33.0>, kie vi ekscios kiel registriĝi kaj uzi la forumon.

Pluraj aliaj kategorioj kaj rubrikoj alvenos, laŭ nia bezono kaj laŭ via disponeblo kunlabori. Ni atendas vian partoprenon!

Gazetaraj Komunikoj de UEA

la verda KoRo

kultura revuo

ESPERANTO – AMUZA LINGVO!

Tatjana Auderskaja. Intelektaj amuzoj. Lingvaj ludoj en Esperanto – Novjorko: Mondial, 2016. 114 paĝoj. Mola bindo, 21,5 cm × 28 cm. ISBN 9781595693228

LITERAJ AMUZOJ – VORTAJ AMUZOJ – TEKSTAJ AMUZOJ – ŜERCAJ AMUZOJ – POEZIAJ AMUZOJ – KRUCENIGMOJ
(kun solvoj!)

Aĉetu papere ĉe UEA, Mondial, Bookdepository, Amazon, aŭ serĉu ĉe <http://www.librejo.com/naciaj-retejoj.html>, indikante la supran ISBN-numeron aŭ la libro-titolon.
Aĉetu elektronike ĉe Google Play

Jen unika libro.

La unuan fojon en la historio de Esperanto estas eldonita pli ol 100-paĝa libro, plene konsistanta el lingvaj ludoj. Ja nia lingvo jam estas sufiĉe matura por doni eblecon kompili tiom ampleksan libron el 43 ludoj kaj 1240 taskoj.

La ludoj estas diversaj: literaj, vortaj, tekstaj, ŝercaj, eĉ poeziaj. Ĉiuj ludoj estas tute originalaj kaj preskaŭ ĉiuj – nenie publikigitaj. La libron oni povas uzi kiel por lernaj, tiel por distraj celoj; oni povas solvi enigmojn konkure en teamoj (ekz. en kursoj de progresantoj) aŭ sole por propra plezuro.

Spertuloj ankoraŭfoje konvinkiĝos pri la propraj scioj, kaj progresantoj trovos abundan terenon por plibonigi en amuza formo sian lingvan nivelon.

La libro estas rekomendata por ĉiuj, kiuj amas nian lingvon.



AMUZAJ, SED NE KONTUZAJ!

Ĉe la eldonejo “Mondial” aperis la libro de Tatjana Auderskaja “Intelektaj amuzoj” (kovrilpaĝa kromtitolo “Lingvaj ludoj en Esperanto”). En la antaŭparolo Tatjana skribas: “... ankoraŭ ne aperis diversflanka libro, kiu provus kunligi sub la sama kovrilo multajn specojn de plej variaj lingvaj amuzoj”. Kaj jen ŝi provas krei tian libron, kiu estus utila kaj dum lernado de la lingvo, kaj por amuzado dum Esperantaj aranĝoj, kaj simple por plezurigi sin vespere hejme.

La libro entenas 43 ludojn kaj 1240 taskojn, kiuj estas distribuitaj jene: 11 literaj ludoj, 13 vortaj ludoj, 4 tekstaj ludoj, 7 specoj de krucenigmoj, 5 poeziaj ludoj, 3 ŝercaj ludoj; krome enestas 49 originalaj langorompiloj por ĉiu sono de Esperanto kaj ankaŭ por sonkunmetaĵoj, malfacile prononceblaj en kelkaj naciaj lingvoj.

La libro estas sistemece komponita: de la relative facilaj literaj taskoj ĝis la plej komplikaj poeziaj, destinitaj por veraj sciantoj de niaj kulturaj valoroj. Por ĉiu ludo, ĉiu tasko fine de la libro troviĝas detala respondo.

Por solvi ĉiujn taskojn, bezonatas, krom scio de la lingvo kaj ĝia literaturo, ankaŭ ia vervo, spriteco, mensa elasteco, kiu ofte dormas profunde de la homo kaj ne tuj sin montras. Tial la taskojn ofte akompanas per rekomendo: “Ni konsilas solvadi ĉiufoje po 10 vortojn, kaj je la fino la rezultoj devas nepre pliboniĝi”.

La parto “Literaj amuzoj” komenciĝas de diversspecaj anagramoj, kies tasko estas relative simpla kaj postulas nur mekanikan manipuladon de literoj. Sed poste sekvas la konkurso “Enmetu post pripenso”, kies nomo mem anoncas bezonatan agon. Pripenson bezonas ankaŭ aliaj konkursoj ĉi-parte, kaj la lasta, “Vizito al zoo”, – aldone humursenton.

En “Vortaj amuzoj” spritecon bezonas fakte ĉiuj ludoj, kaj aparte – denove prinatura “Freneza genetikisto”. La aŭtoro eĉ avertas la solvontojn, ke ili ne protestu kaj ne indigniĝu pro la tre strangaj ricevitaj hibridoj. Ja tio estas nur lingva ŝerco! Du konkursoj: “La sama kapo” kaj “La sama vosto” estas, laŭ mi, tro longaj: la aŭtoro montras sian erudicion kaj vicigas longajn liniojn da vortostumpoj. Jam post kelkaj tiuj jam kompreneblas la solvo, kaj plua legado de multaj sensencaj vortopartoj enuigas. Neimageble longa (99 taskoj, aŭ 99 × 3 = 297 solvendaj vortoj!) estas la ludo “Rompitaj radikoj”. Tamen la longecon kompensas simpleco de la solvoj kaj eleganta maniero klarigi la vortojn. Krome, la aŭtoro elpensis bonan metodon por ne ekdormi dum la solvado: por ĉiu deko da solvitaj taskoj ŝi donas apartan solvendan problemon tute alispecan.

“Komprenu la ideon”: estas tre facila, laŭ mi. “Komplementaj paroj” –

bonega konkurso; ĝi postulas kaj spritecon, kaj konon de Esperanta gramatiko. Kaj jen terura konkurso, kiu turnas la cerbon inverse: “Malŝaradoj”. Mi dubas, ĉu iu eĉ komprenos, kion fari en ĝi. Se tia persono troviĝos – ŝi/li meritos la kronon de la plej cerboturn-kapabla esperantisto de la mondo! Sed feliĉe – kaj kompense – la lasta konkurso de la ĉapitro nomiĝas (ne vane!) “Plej simpla konkurso”. Tie via varmigita cerbo povas ripozi inter klaraj kaj elegantaj demandoj.

“Tekstaj amuzoj” – nu, komenciĝis la ludoj por veraj sciuloj. Ekde nun vi devas scii la titolojn de multaj Esperantaj verkoj (entute 72 titoloj), rekoni iujn ĉifritajn konatajn frazojn aŭ esprimojn, trovi kaŝitajn en la tute alitema teksto citaĵojn de la fama poeto aŭ proverbojn el “Proverbaro Esperanta” de L.L.Zamenhof. La konkursoj estas tre interesaj kaj allogaj, kaj solvadon helpas indikoj, kiom da vortoj estas en la celita frazo kaj eĉ kiomsilabaj estas la vortoj kaj al kiu vortklaso ili apartenas. Estas ankaŭ aparta, nekomplika, sed amuza konkurso pri 50 proverboj de Zamenhof.

Kaj la krono de la libro – “Poeziaj amuzoj”. Ilin antaŭas la listo de 42 titoloj de poemoj kaj kantoj, kiujn devas koni la legonto. Ne nur koni, sed, dezirinde, scii parkere aŭ almenaŭ bone orientiĝi en ili. Kaj mi povas nur miri, kiel eltrovema estas la menso de la aŭtoro por tiel eltordi kaj alivesti ĝis nerekonebleco la famajn liniojn de niaj ŝatataj poetoj aŭ karaj kantistoj.

Jen el originalaj linioj restis nur la finaĵoj de la vortoj kaj iliaj silabkvantoj. Jen male, restas nur la unuaj literoj. Jen la linioj estas senŝanĝaj, sed el ili estas kuirita “Versa kompoto”, en kiu la naturon de ĉiu “frukto” ni devas diveni. Jen la “vaste konata en malvastaj rondoj” ludo, pri kiu oni organizas (sed nur en la rusa lingvo) eĉ ĉampionecojn landajn kaj internaciajn! Sed mi devas diri, ke la reguloj estas kompreneblaj, kaj diveni la solvojn, des pli por iama SEJT-ano, tute ne estas malfacile, sed agrable, amuze kaj gaje. La lasta ludo de la libro tute ne estas komplika: nur enmetu la vorton; kaj en la fino vin atendas bela surprizo!

Kaj laste sed ne balaste – “Krucenigmoj”. Vin atendas 20 diversaj krucenigmoj: ĉenaj, klasikaj, duobla, itala, hungaraj, rondaj...

Nun mi dezirus aldoni kelkajn kritikajn rimarkojn. Unue, laŭ vidpunkto de instruanto de Esperanto mi preferus pli striktan dividon de ĉiuj ludaj taskoj laŭ ties komplikgrado por ke estu pli facila instrucela elekto. Eble indus dividi la libron je du rubrikoj kun probablaj titoloj “Por studantoj de Esperanto” kaj “Por lingvospertuloj”. Ĉe tio la sistemigaj partotitoloj povus ripetiĝi en ambaŭ rubrikoj. Tio plifaciligus elektotaskon ankaŭ por individuaj (memstaraj) ludantoj: ili povus provi siajn intelektajn fortojn komence en la unua rubriko sen risko tuje kunpuŝiĝi kun tro komplikaj por si taskoj kaj perdi intereson al plua ludado.

El la sama metodika vidpunkto mi proponus al la aŭtoro ne meti antaŭ la ludoj, proponataj por ne tre spertaj lingvoposedantoj, indikojn, dum kiom da tempo oni solvu la taskojn. Tio taŭgus nur por apartaj spertuloj kaj eĉ por ili – precipe dum eventualaj konkursoj dum diversaj komunaj aranĝoj de esperantistoj. Multaj homoj (ekzemple mi) ne ŝatas similan "stimuladon" kaj pritakson de ties intelektaj kapabloj ("bravulo", "superulo", "geniulo"). La ludanto, kiu regule ne kapablos observi tiujn tempajn limojn, povas frustriĝi kaj desapontiĝi pri la ludado. Krome, kiel la aŭtoro imagas teknikan flankon de la tasko: ĉu la individua ludanto (sen flanka kontrolanto) devas meti antaŭ si horloĝon kaj atenti ĝin anstataŭ koncentri sin por la ludo? Mi dubas, ke ŝi/li ricevos plezuron de tia proceduro. Laŭ mi, ĉefa celo de proponataj ludoj estas kontenteco, kiun ricevos la ludanto sendepende de pritakso de sia intelekta kapablo. Do, la amuzaj ludoj ne estu kontuzaj!

Entute la libro impresas pro sia alta nivelo, profesieco, profunda scio de nia lingvo kaj ĝia kulturo, estimo al la leganto kaj fido je lia potenco. Malgraŭ siaj ofte (eble eĉ tro) komplikaj taskoj, ĝi estas "amika al la leganto", se uzi nuntempan esprimon. La aŭtoro serioze traktis tian neseriozan temon, kiel ludoj, kaj eĉ nomis ilin "amuzoj". Kaj vere, post la legado aperas sento, ke oni bone amuziĝis en bona kompanio.

Kaj ankoraŭ unu ne tro ofta trajto: sur la 114 grandformataj paĝoj mi trovis neniun tajp- aŭ vorteraron. La libro estis senriproĉe redaktita de nia Viktoro Aroloviĉ – profesia redaktoro, esperantisto kaj partoprenanto de intelektaj ludoj (li plurfoje partoprenis en la populara televida kvizo "Propra Ludo") en la sama persono. Tatjana en la antaŭparolo nomas lin eĉ "preskaŭ kunaŭtoro", kaj tio certe ne estas troigo. Dankon al ili ambaŭ!

Ludmila Novikova (Moskvo)



Dialektika poezio

(Al la 120-jariĝo post la naskiĝo kaj la 80-jariĝo post la pereo de Eŭgeno Miĥalski)

Inter la plej brilaj Esperanto-poetoj sendube troviĝas Eŭgeno Miĥalski (21.01.1897 – 15.10.1937), laŭ la fama rimportreto de Kolomano Kalocsay – "flirta papilio". Nu jes ja, tiu difino venas el lia famega poemo:

Estas mi – papili'
gajflirtanta en aero,
dancas mi, ĝojas mi
tutan tempon dum somero.
(Papilio)



Li naskiĝis en la ukrainia urbeto Leticêv, lernis en gimnazio en Voznesensk (ankaŭ Ukrainio), poste loĝis en Saratov, Odeso, Stalino (tiam Doneck)… Kvankam lia vivo estis plejparte ligita kun Ukrainio, li multe pli apartenis al la rusaj kulturaj kaj lingvaj tradicioj (li estis bibliotekisto kaj instruisto de la rusa lingvo kaj literaturo), kiujn tre sukcese greftis al la kulturo Esperanta. Almenaŭ en liaj esperantlingvaj verkoj klare senteblas influo de rusaj poetoj de la "arĝenta epoko", simbolistoj kaj futuristoj – Balmont, Brjusov, Ĥlebnikov, Severjanin, Majakovskij… La lasta estis por li modelo de la rilato al la poezia verkado.

Konatiĝinte kun Esperanto en la aĝo 14-jara, li en 1917 provis fondi Esperanto-revuon kaj verkis poemojn. La epoko koincidis kun la Dua rusa revolucio, kaj la revolucia konscio kvazaŭ nature penetris lian menson. Kaj la dialektiko (en la hegel-marksa senco) fariĝis por li la natura mondpercepto, troviĝinta en la ĉirkaŭa aero. Kiel diris Majakovskij pri si mem:

Dialektikon
ni lernis ne el Hegel,
militfajro
ĝin en niajn versojn ŝutis,
kiam
sub kugloj
la burĝojn ni pelis ege,
kiel nin
alitempe
ili persekutis.
(Per plena voĉo, trad. de K.Kalocsay)

Revolucieco senteblas ne nepre (eĉ ne ĉefe) en liaj "sociaj" poemoj, sed ankaŭ en la plej intimaj lirikaĵoj – kio, cetere, rilatas ankaŭ al pluraj samtempaj rusaj poetoj. Kiel la futuristoj, kiuj serĉis novajn internajn eblojn en la nacia lingvo, Miĥalski provis trovi ilin en la lingvo internacia kaj sukcesis malkovri profundan filozofian sencon eĉ en pure gramatikaj formoj de nia lingvo:

"Is" – "As" – "Os"
tri elementoj de l'Tuto,
finito, vivato, ĥaos' –

problemo de Absoluto.
(Enkonduko)

Esperanto por li estis tiom natura esprimilo, ke iuj stumbloj en ĝia apliko simple ne ekzistis. Lin oni foje riproĉas nur pri certaj gramatikaj eksperimentoj, kiel forlaso de la sufikso *-ul-* en in-vortoj (*junino, karino* ks), aŭ adjektivigo de pluralo (*arboja ombrel'*), sed tio ne aspektas tro granda "peko", ĉar reale glate kompreneblas kaj kontribuas al la esprimivo. Ĝenerale, lia propra karakterizo de sia poezio estas plene adekvata:

Perlas per la belo stelo-stilo,
kun facilo ŝprucas Esperanto —
gaja tril' de l'najtingalbabilo
dum trankvilo de l'printempa kanto.
(Perlas per la belo stelo-stilo)

Dialektiko en la socia vivo riveliĝas jam en la plej fruaj poemoj de Miĥalski, sufiĉas rememori lian poemon *Fajro kuracas* (ĉu ne esprimas kontraŭdiron jam la titolo – cetere, traduko de la latina *ignis sanat,* kiu devenas el aforismo de Hipokrato?):

Antaŭen kaj antaŭen! Al novaj idealoj!
Al nova viv-konstruo! Al nova viv-rimed'!
Ni eĉ ne haltu antaŭ kruelaj sangbataloj!
Ni ne kompatu, premu la florojn sur la bed'!

Cetere, la linioj estis verkitaj la 10-an de oktobro 1917, ankoraŭ antaŭ la Oktobra renverso – tia estis la ĝenerala humoro de junaj inteligentuloj dum la revolucio… Tiel marksismo por la revolucia generacio estis nature kaj facile akceptata, kaj Esperanto fariĝis ĝia esprimilo:

"Is – as" = estiv'
sekvigas "os"-energion,
tiel socia viv'
produktas konscion.
(Enkonduko)

Sed dialektikajn kontrastojn li trovas ankaŭ en si mem, kaj la dialektikan lukton li ekvidis eĉ en la rilatoj inter la virino kaj la viro, kaj ĝi plene penetris lian amlirikon:

Mi kaj vi: jen kontrasto, jen sumo,
mi kaj vi: jen eksplodo, jen fal',
mi kaj vi: jen abismo, jen lumo,

mi kaj vi: jen nur "de", kaj jen "al",
...
(Al virino)

Aŭ tiel:

Novo – malnovo,
eterno – momento,
potenco – senpovo,
feliĉo – turmento.
(Paraleloj)

Poemoj ĉiutemaj – amaj, filozofiemaj, socialaj… Ĉio kreiĝis samperiode. Eldonante sian "jubilean" kolekton *Prologo*, dediĉitan al la dekjariĝo de la verkado, li sagace elektis ĉion la plej elstaran, kion li verkis en sia frua kaj pinta periodo…

Krome, tre granda atingo de Miĥalski en la poezio estas alta erotikeco. Amliriko en Esperanto ekzistis antaŭ li, sed, ni diru, "senkarna". La pli "fiziologian" aspekton ellaboradis poste Kalocsay, sed iom koste de lirikeco. Jes ja, erotiko en la arto estas, verŝajne, la plej komplika afero – ĝi devas esti tre sincera kaj forme altnivela por ne gliti en krudecon. (Post Miĥalski, eble, nur W.Auld atingadis tiun gradon en kunfando de la erotiko kun liriko.) Jen, ekzemple, fragmenteto el *Amaj melodioj*:

Nin ĉirkaŭas freŝgirlando el la floroj,
de l'muziko bela rava son'...
Vokoj-ploroj el verando kun mistiko
de ribela fluas violon'.

Inspirite de ĉi-sonoj mi cin kisas,
tremas cia kortuŝite brust',
nin kulisas floraj kronoj... mi cin premas,
dolĉo mia... benas nin arbust'.

Li okupiĝis ankaŭ pri organizaj aferoj, eldonis kaj redaktis revuojn, sekretariis en IAREV, sed pure kreaj poeziaj okupoj estis multe pli gravaj por li kaj por la historio. Tamen li ne estis fekunda verkisto – lia literatura heredaĵo konsistigas nur unu volumon, kaj plej granda parto de liaj poemoj, eldonitaj siatempe en kvin libretoj, estis verkita inter 1917 kaj 1923. Poste lia kreivo fariĝis malpli intensa – kiam la revolucia elano en la lando estingiĝis, la poeto ne plu havis kreimpulsojn.

Fakte, li bone vidis ŝanĝiĝon de la sociaj cirkonstancoj, kiam la plejanime akceptita marksisma dialektiko iĝis kompleto de rigidaj oficialaj

dogmoj kaj transformiĝis je formo de nova religieca skolastiko. Sed religiajn dogmojn kaj iliajn portantojn, diference de sincera religia ekstazo, li ĉiam abomenis. Sincera homo en tiuj kondiĉoj apenaŭ povas elvivi – ĉu fizike, ĉu personece:

Hom' ne povas resti longe sen idoloj,
detruinte unujn, kreas jen alian…
Nur varias formoj, sed ne la simboloj;
kaj neniam oni venos finstacion…
Kaj mi serĉas, volas trovi la eliron
por min liberigi je medio verma.
Ho, ĉu mi sukcesos venki la vampiron
Aŭ min mem minacas la ekstermo…
(Mia koro mortis...)

Bedaŭrinde, tiuj vortoj evidentiĝis profetaj…

La nomo *Prologo* de lia ĉefa poezia kolekto devis aludi, ke sekvos pliaj elstaraj verkoj. Tamen tio ne okazis – en la posta kolekto *Fajro kuracas* estas kelkaj fortaj versaĵoj, kreitaj dum la revolucio – kaj… la novaj, kvazaŭ sinperforte verkitaj, estas multe malpli bonaj. La lasta kolekto – *Kantoj de Amo kaj Sopiro* – konsistas el nepublikigitaj pecoj de la sama frua periodo, sed plejparte malpli fortaj ol tiuj en *Prologo*. Do, lia reala poezia elano elĉerpiĝis kaj ne sukcesis renaskiĝi.

Tamen, ĝis la lastaj tagoj de sia vivo Miĥalski restis arda esperantisto, kiu zorgis pri la internacilingva kulturo, laŭeble adaptiĝante al la ĉiam malboniĝantaj sociaj kondiĉoj. Iuj provoj savi la movadon en la totalisma sistemo, kiu finkreiĝis komence de la 1930-aj, komence helpis, sed nenio povis helpi kontraŭ la granda teroro de 1937–38 – ĝi kiel asfalta glatigilo ruliĝis super sovetiaj esperantistoj, dispreminte la movadon kaj pereiginte multajn aktivulojn. Pereis ankaŭ Miĥalski. Ĉesis la vivo, sed restis la poemoj, kiuj vivos tiom, kiom vivos nia lingvo.

La krea heredaĵo kaj la biografio de Miĥalski estas vaste konataj. Liaj poemoj eniris diversajn antologiojn kaj krestomatiojn kaj, mi dirus, apartenas al la bazaj kulturaj scioj de esperantistoj. Por iuj verkistoj tio foje ne servas bone – ili "bronziĝas", la memoro pri ili rigidiĝas, kaj la verkoj, eĉ konataj, fariĝas malvivaj. Tamen al Miĥalski tio ne rilatas – liaj poemoj estas plu freŝaj – tiu, kiu jam ilin konas, ĉiam revenas al ili por relego, kaj por tiu, kiu la unuan fojon kun ili konatiĝas, ili fariĝas vera revelacio. Povas esti, ke ĝuste la dialektikeco de liaj verkoj malebligas al ili velki? Almenaŭ tion, kiel esencon de lia poezio, emfazis en unu el siaj plej brilaj rimportretoj K.Kalocsay:

Kaj – jen la ĉefa antaŭ ĉio:
Fieras li (ne sen motiv')
Pri la malkovro, ke pasiv'
Dialektikas kun pasio.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

Eŭgeno Miĥalski[1] Евгений Михальский

tradukoj al la rusa de Ludmila Novikova (2008, 2017)
переводы с эсперанто Людмилы Новиковой (2008, 2017)

MI ESTAS...

Mi estas pokalo de belpoezio;
Mi estas martelo de ver',
Mi estas fontano de versfantazio,
Potenca liber'!

Mi estas modesta, sen celo je "nomo";
Mi estas fluganta la vent';
Mi estas de floroj flosanta aromo,
Ribela torent'.

Mi estas realo. Mi estas fantomo.
Mi estas de l'am' sakrament'.
Mi estas animo kaj koro de l'homo,
Rapida moment'.

Mi flugas tra l'mondo kaj ĉiuj min kantas.
Mi flugas per kanto-flugil'.
Mi flugas fajrere kaj flamdiamantas
En koroj per tril'.

Mi celas ne famon. Mi celas

Я – КУБОК ХРУСТАЛЬНЫЙ…

Я – кубок хрустальный поэзии чистой;
Я – истины молот стальной,
Я полон фантазии чудно-игристой,
Свободы шальной.

Я весь незаметный, как ветер парящий,
Я – в поле пахучий цветок;
Я – голос стихии, крушеньем грозящей,
Мятежный поток.

Я – подлинность жизни, и я – привиденье.
Я весь – воплощенье любви.
Я – сердце влюблённого в миг откровенья
И жара в крови.

Лечу я по свету на крыльях творенья,
Лечу я, и сердце поёт.
Лечу я как искра огня вдохновенья,
Что души зажжёт.

---

[1] Ĉiuj versaĵoj estas prenitaj el la libro "Prologo" (1929), laŭ la reeldono en 2002 – <http://esperanto.net/literaturo/poem/libr/prolog.pdf>, krom "Hispana romanco" kaj "Traktoro" – el la libro "Fajro kuracas" (1932).

ne "nomon".
Mi celas ne brilon de l'or'.
Mi celas ne laŭrojn, nek bardan
diplomon,
Nek pompon de l'glor'.

Mi kreas por krei. Sen ia kromcelo.
Mi kreas poemon el kor'.
Mi kreas per ĝi monumenton
de l'Belo
En versa kolor'.

Saratov, 28 Decembro 1918

Ни слава, ни "имя" меня
не прельщают,
Ни золото звонких монет,
Ни барда диплом, о котором мечтает
Тщеславный поэт.

Творю для творенья. Без видимой
цели.
Творю жаром сердца и слов.
Творю Красоту чистотой акварели,
Палитрой стихов.

MI STELOJN JUNGOS AL REVADO

Mi stelojn jungos al revado,
kaj ili portos min tra bluo
en landon de la nemortado,
de la eterna vivo-ĝuo.
Do, arogantu mia kanto,
do, akresonu mia verso.
Mi estas forto kaj giganto
kaj regontul' de l'universo.
La morto?! Ho, ĝi plu ne tedos,
restinte sole nur simbolo;
je l'universo nur procedos
la menso de l'scienca volo.

Voznesensk, 26 Oktobro 1921

Я ЗВЁЗДЫ ЗАПРЯГУ В МЕЧТАНЬЯ

Я звёзды запрягу в мечтанья,
они меня примчат в мгновенье
в страну не смерти и страданья,
а вечной жизни в наслажденьи.
Звучи, мой стих, пронзая души,
Будь, моя песня, дерзновенной.
Я – великан морей и суши,
Я – повелитель всей Вселенной.
Что смерть? Придётся ей оставить
людей, она – лишь звук
без смысла;
теперь Вселенной будет править
полёт одной научной мысли.

PERLAS PER LA BELO STELO-STILO…

Perlas per la belo stelo-stilo,
kun facilo ŝprucas Esperanto –
gaja tril' de l'najtingalbabilo
dum trankvilo de l'printempa kanto.
Amo de l'universeca koro
en kristalo de l'penetra penso

ПРЕЛЕСТИ АПРЕЛЯ – СТИЛЬ ПАСТЕЛИ…

Прелести апреля – стиль пастели,
без усилий льётся эсперанто –
звон весёлый соловьиной трели
в благости весеннего бельканто.
Чувства всеобъемлющего сердца
в хрустале провиденья искрятся,

brilnuancas en bukedo-ĥoro,
sonparfumas en versaĵ-incenso,
vibras en la melodioj-ĉarmoj –
fibroj de l’animo poezia, –
en ĝoj-ploro aŭ maldolĉaj larmoj,
en intimo kun revad’ vizia.
Torenteco de l’pasi-deziro
sur la verda kampo de la amo,
radieco de l’revad-inspiro
kaj neniam foriĝanta flamo.
Antaŭ la ĝardeno de l’beleco,
permanenta cel’ al grandiozo,
for de l’korpo en la animeco
estas mia farnient-ripozo.

Voznesensk, 1 Aprilo 1922

вот букетом ярким рвутся рдеться,
в звучном ладане стихов курятся,
вот дрожат в мелизмах
нежно-тонких
струны поэтической натуры, –
в плаче радости, рыданьях горьких,
в призрачных мечтаньях трубадура.
Бурный ливень страстного желанья
на любви вечнозелёном поле,
искры вдохновения-мечтанья
пламени, не гаснущего боле.
В райских кущах красоты небесной,
в вечной тяге к грандиозной цели,
лишь в души витаньях,
внетелесно –
вот мой отдых, полное безделье.

AMAJ MELODIOJ

I

Finiĝas nokto. En ĉirkaŭpreno
ci kisas min, karesas, flustras
kun pasio.
Susuras silko sur kuseno...
Maten’ de l’am’, de l’tag’
mateno... –
Unua ora sunradio
penetras ĉambron tra kurteno...
Okulojn ci fermetas, dronas
en ebrio...
Leviĝas mi, malfermas pordon
al ĝardeno...
Parfumas mole akacio...
Kaj ĉio vokas, logas al promeno;
kaj spiras vera poezio
en tiu ĉi vilaĝ-edeno.

Ci levas ankaŭ cin kaj min pro ĝeno
elpelas for kun koketema krio:
”Ho, iru tuj – ne estas ja konveno

МЕЛОДИИ ЛЮБВИ

I

Ночь кончилась. Ты меня
ласкала,
шептала страстно, целовала
снова, снова.
Шуршало шёлком покрывало…
Рассвет любви, и дня начало…
Луч первый солнца золотого
проник сквозь шторы в окна зала…
Закрыв глаза, ты нежишься
в тени алькова…
Встаю я, открываю двери в сад…
Свежало…
Нежнейший аромат вишнёвый…
К моей прогулке всё располагало;
и поэтическое слово
здесь, в райских кущах, оживало…

С кровати ты уже стыдливо встала
и крикнула кокетливо-сурово:
“О, поскорее выйди – не пристало

ĉeesti dum ceremonio
de la vestado.”
– “Granda Dio!
Pro kio tia ĉi kateno!
Cin ĝui volas mi ja ankaŭ
dum mateno...”
Sed pordo frap! eĉ malgraŭ
mia peno
kaj malgraŭ mia opinio.

Saratov, 19 Januaro 1921

II

Heine-ecaĵo

Puto profunda – jen Via rigardo,
puto kun akvo serena;
tamen, junino, mi estu singarda:
eble ĝi estas venena!?
Bluo ĉiela – jen Via rigardo,
bluo karese-edena;
tamen, karino, mi estu singarda:
eble ĝi estas gehena!?
Lango korala – jen Via ponardo,
lango alloge-kaprica;
tamen, belino, mi estu singarda:
eble ĝi estas malica!?
Via buŝeto, brulanta en ardo, –
– rozo ravanta kaj bena;
tamen, junino, mi restu singarda:
eble ĝi estas venena!?!

Voznesensk, Oktobro 1921

III

Mi min kaŝis en bosko kaŝtana
en krepusk’ de l’printempa vesper’,
sur la musk’ sub la kron’ diafana
kuŝis mi. Simfoniis mister’.
La mister’ de l’natur’ simfoniis:
en folioj susuris fabel’,
en river’ en reflektoj helstriis

следить за мною, право слово,
как одеваюсь”.
– “Это ново!
Напрасно это ты сказала!
Хочу я созерцать тебя без одеяла…”
Но дверью хлоп! Моих желаний
мало!
Её желания – основа.

II

В подражание Гейне

Колодец глубокий – вот твои очи,
с чистой, прозрачной водою;
но сомневаюсь я, девушка, очень:
вдруг он отравлен тобою!?
Синь неба ясного – вот твои очи,
ангельски нежные взгляды;
но сомневаюсь я, милая, очень:
Вдруг ты исчадие ада!?
Острый язык твой как сабля
без ножен,
что так сверкает прекрасно;
но должен быть я, краса, осторожен:
эта игрушка опасна!!
Губы твои так пылают от страсти,
словно пурпурные розы;
но воздержусь и от этой напасти:
могут от роз быть занозы!!!

III

Я скрывался в каштановой роще,
в полутьме мир весенний молчал,
я на мху под листвою проросшей
возлежал под симфонию чар.
Чародейство природы звучало:
шелест сказки средь чудных теней,
в отражении речки журчало

per la plektoj arboja ombrel'!
Kaj mi ĝoja en reva krepusko
sur la lim' de la lum' kaj mallum'
ne evitis fatalan embuskon
kaj fariĝis viktim' de l'parfum'.
De l'parfum' de la korpo virina
aperinta subite en bosk',
saturite mi svenis al sino,
kien logis potence la mosk'.
Kaj kadence trembatis la koro
pro alflu' de l'volupta pasi';
kaj en ĝu' de l'virgeca doloro
mi abruptis kaj dronis en ŝi....
Disburĝonis kaŝtanaj la floroj
kun kreiv-geedziga polen',
ĝi miksiĝis kun niaj odoroj
en mistera pasia solen'.

Voznesensk, 11 Decembro 1923

IV

En koloroj de vespero am' fabelas,
lulas senton de la koroj am',
jen mantelas per etero, jen nebulas
firmamenton je l'disiĝo-gam'.
Nin ĉirkaŭas freŝgirlando
el la floroj,
de l'muziko bela rava son'...
Vokoj-ploroj el verando
kun mistiko
de ribela fluas violon'.
Inspirite de ĉi-sonoj mi cin kisas,
tremas cia kortuŝite brust',
nin kulisas floraj kronoj... mi
cin premas,
dolĉo mia... benas nin arbust'.
Sed jam falis noktaj horoj... mortis
kantoj,
kiujn pure najtingalis kor'...
Diamantoj-rememoroj restis nure...

кружевное плетенье ветвей.
И я в радостных грёзах услады
на границе меж светом и тьмой
не сумел избежать той засады
и стал пленником встречи ночной,
ароматов от женского тела,
пронизавших вдруг томную тьму.
Я, влекомый к нему, очумелый,
погрузился в его глубину.
Сердце билось всё боле и боле
в вожделенной той глубине;
в наслаждении девственной боли
замер я, очутившись на дне…
Расцвели вдруг цветы на каштанах
со своей жизнетворной пыльцой,
и смешалась она с духом пряных
чар таинственной страсти людской.

IV

В красках вечера любовь колдует,
колыбельно тешит нам сердца,
то эфиром, как плащом, накроет,
то разлукою задует небеса.
Окружают нас цветочные гирлянды,
музыки чарующий мотив…
Звуки страстные доносятся
с веранды –
это скорбной скрипки
плач-призыв.
Вдохновлённый звуками, тебя
лобзаю,
и дрожит в моих руках твой
бюст,
под венком цветочным я тебя
сжимаю,
моя сладкая… нас обвенчает
куст.
Вот спустилась ночь… умокли трели
соловьиные в сердцах у нас…

... amaj ĉarmoj pasis for.

Saratov, 14 Decembro 1918

И остались лишь воспоминаний перлы…

… жар любви утих, погас.

CIKLO DE L'ARĜENTA ASTRO

Dediĉas al Nekrasov N.

I

Aspergas mi per spermo de l'espero
virginon de l'arĝenta astro
en la arom' de ŝia sino ĉasta
dum farniento de l'vespero.
Aspiras mi per spiro de l'pasio
elkrei novan mondon de la sonoj –
mi, nova pastro de l'venonta dio:
virgino de l'arĝenta astro
de l'fantaziaj tonoj.
Al foraj kaj viziaj regionoj
mi venas de l'estonto gasto,
virginon aŭreolos mi per kronoj
el fonto de l'anim' elasta.
Karesvario – ritmo de l'mezuro
de mia am' senfunde-ĝua;
kaj kisoj dolĉaj – rimoj-uverturo
de l'delikatpasio blua.
Kaj sakramentas mi dum la vespero,
mi nova, juna kaj onteca pastro,
virginon de l'arĝenta astro
aspergas mi per spermo de l'espero.

II

En ornato orname orita
ĉe altaro de l'vorto mi staras,
kiel orfo ĉe pordo fermita
de l'morto...

ЦИКЛ СЕРЕБРЯНОЙ ПЛАНЕТЫ

Посвящается Некрасову Н.

I

Я окропляю спермой упованья
Деву серебряной планеты,
её невинности благоуханье
в часы ночного far niente[1].
Стремлюсь порывом моей страстной лиры
построить новый мир созвучий –
я, новый жрец грядущего кумира –
Девы серебряной планеты –
в тонах фантазии кипучей.
К далёким и неведомым атоллам
лечу я, гость из новой эры,
Я короную Деву ореолом
огня духовной атмосферы.
Её я обласкаю тактом-ритмом
моей любви бездонно-нежной
и поцелуем – увертюрой-рифмой
потока пылкости безбрежной.
Священнодействую по вечерам я,
жрец новоявленного света,
Деву серебряной планеты
я окропляю спермой упованья.

II

В ризе, золотом ярко расшитой,
я стою у святилища слова,
сирота возле двери закрытой
смерти…

[1] *far niente* (итал.) – безделье, праздность, ничегонеделание; *farniento* (Esperante).

Kaj orgen’ al orelo ordonas
enaŭskulti por ĉiam sonkulton –
orakolon de la Oriono
radia...
Tra la orto al la oriento
kore celas dezire-ribela
oremuso de mia belsento
aspire...
Oro, ornamo, ornato
alternas en alto interna...
Mi – pastro de la nekonato –
staras ĉe ĝia altaro
lumate de l’astro eterna
arĝenta.

Приказал мне орга́н одеона
слушать о́рганом слуха культ
звука –
от оракула Ориона
лучистого…
Оком сердца в сторону востока
целится желающе-мятежная
моя молитва чувства превысокого
устремлённо…
Риза, злато, узоры
светятся внутренним светом…
Я, жрец неведомой сферы,
у алтаря её стоя,
свечусь светом вечной планеты
серебряной.

III

Per akraj strofoj mi traversos vivon,
kreante revan riĉon,
amaran forgesante efektivon
kaj malfeliĉon.
El kaĝo de l’tagvica trivialo
mi celas al mistera transo,
mi – Don Kiĥot naivkristala –,
por esti for de Sanĉo-Panso.
Per trilflugiloj de koloroj-versoj
nuancas mi per skvamoj-asonancoj
kaj ronde-flugas tra la universo
en furioz-ebriaj dancoj.
Por iu “danse macabre”, – por mi
nur gajo
kaj senfineco de l’mezuro,
por iu – vintro, sed por mi –
floranta majo
kaj brila suno en lazuro.

III

Я облеку в стихи существованье,
создав иллюзий море,
я позабуду все свои страданья
и даже горе.
Из скуки повседневной клетки
тесной
стремлюсь к таинственному трансу,
я – Дон Кихот наивно-честный –,
чтобы уйти от Санчо Пансы.
Порхание поэзии весенней
я оттеняю ритмом ассонансов,
и я кружу, летая во Вселенной,
в неистовости пьяных танцев.
Кому-то “danse macabre”[1], а мне –
веселье
и бесконечность внеземного,
кому – зима, а мне – весны цветенье
и яркость неба голубого.

---

[1] *danse macabre* (фр.) – “Пляска смерти” – танец, который, по средневековым представлениям, исполняли мертвецы;
“Danco de la morto” (Esperante) – danco, kiun plenumis mortuloj laŭ mezepoka mondpercepto.

Ĉu iu kredos mian religion –
ne interesas min ja tio,
sed mi adoras fantazion, –
ĝi estas mia dio.
Kaj antaŭ la altaro de Fabeloj
incensas mi, poeto-pastro;
Virginon de l'arĝenta astro
adoras mi en himnoj belaj.

Будут верить в мою веру или нет –
всё это для меня едино;
фантазия – моей любви предмет,
она – моя богиня.
Курю я фимиам жреца-поэта
пред алтарём воображенья;
Деву серебряной планеты
я славлю гимном вдохновенья.

IV

En maten' perlamote flagranta,
kiam brilis la ros' en petaloj,
al surlagaj lilioj-pokaloj
vidis mi beljuninon kurantan.
Diafanis la korpo gracia,
en la faldoj de lag-arbetaro
papiliis orece la haro
sub la kisoj de l'suna radio.
Kaj aero karese vualis
belfiguron de l'stranga junino;
sed subite ŝi falis,
en unu momento
mi alkuris, rekonis:
Virgino
de l'astro arĝenta.

Voznesensk, 28 Novembro 1922

IV

Когда ранним сияющим утром
в чаше лилии – вод королевы –
засверкала роса перламутром,
я увидел бегущую деву.
Над прозрачной фигурой, чаруя,
её волосы так развевались,
словно бабочки ярко порхали
в златосолнечных поцелуях.
Воздух ласково крыл покрывалом
тело нежное странной той девы;
но она вдруг упала,
я тут же, моментом,
подбежал и узнал
мою Деву
серебряной планеты.

HISPANA ROMANCO

De Sevilla ĝis Grenado
En krepusko de vesper'
Sonas dolĉaj serenadoj,
Tintas fero kontraŭ fer'.
A.K.Tolstoj

En noktzefir'
de l' vento ir',
kun bru'
de l' flu'
Gvadalkvivir'

ИСПАНСКИЙ РОМАНС

От Севильи до Гренады
В тихом сумраке ночей
Раздаются серенады,
Раздается стук мечей.
А.К.Толстой

Ночной зефир
Струит эфир.
Шумит,
Бежит
Гвадалквивир.

Suna lando de hispanoj,
Hispaninoj, verva danc’,
Taŭroludoj, ŝprucfontanoj:
Romantiko de l’romanc’.
Or-bracelet’,
krak-kastanjet’
kaj bril’
kaj tril’
de l’amo pet’.

Sankta lando... Franciskanoj,
Jezuitoj... tiel plu.
(Nigra ombro de sutanoj
Sub ĉielkaresa blu’).
En nokta pac’
prelat-palac’;
di-vol’,
konsol’,
popol-donac’!

De Sevilla ĝis Grenado
Flagras brila ilumin’,
Svingas sabroj, tintas spadoj,
Flame ringas fajra vin’.
En suna ard’
Batalstandard’
kun bru’
detru’
ribelbombard’.

Monaĥejoj ĉie brulas,
Kuras pastroj al Franci’;
Ondoj batas, ondoj rulas
De popol-revoluci’.
En bato-pret’
jen bajonet’;
kun bril’
armil’
de la prolet’.

Край испанок и испанцев,
Край фиесты и коррид,
Струй фонтанов, знойных танцев –
Для романса колорит.
Яркий браслет,
стук кастаньет,
и блеск,
и треск –
любви расцвет.

Там иезуитов стая,
Францисканцев разных клан,
(На земле под небом рая
Тень зловещая сутан).
В урочный час
прелата глас:
бог дал –
бог взял,
Он – всё для нас!

От Севильи до Гренады
Пышет пламенем страна,
Сабель звон и свист снарядов,
Ток кровавого вина.
Несносный зной,
знамённый строй:
спеши!
круши! –
мятежный бой.

Вот монастыри пылают,
И в Париж бегут “отцы”;
Своим гневом их смывают
Пролетарии-борцы.
Острее пик
блестящий штык:
сверкай,
свергай
засилье клик!

Vervas preso en Parizo
(malagrabla ja najbar'!)
kaj rapide jen avizo
flug-avertas al "homar'":
"Sovet-influ'
per mono-flu',
agent-
taĉment'
en Kremla lu'".

De Sevilla ĝis Grenado –
Okcidenta uvertur'.
Embarasa serenado
Por la borso kaj tonsur'.
sub suna hel'
Hispan-ribel',
Liber' –
Feder':
!!!Falĉil' – Martel'!!!

Stalino, 18 majo 1931

А в Париже пресса лает
(взбаламутился сосед!)
и по миру рассылает
"человечеству" навет:
"Советский акт,
влиянье – факт,
отряд-
десант
кремлёвских банд".

От Севильи до Гренады
Слышен Запада набат.
В ступоре от "серенады"
Биржи и епископат.
Бунтует чернь,
испанский серв[1].
Свобод!
Народ!
!!! Молот и Серп!!!

TRAKTORO

*Dediĉita al Novjorkaj
esperantistoj-laboristoj,
sendintaj monon por
soveta traktoro*

En kampar' sen lim' kuŝanta
gajaktivas nova viv';
vokas nin traktor' pluganta
al labora kolektiv'.

Sur la kampo jen ĉevalo
strabokulas al traktor':
brilnuancas hela ŝtalo,

ТРАКТОР

*Посвящается рабочим-
эсперантистам Нью-Йорка,
приславшим деньги на
советский трактор*

На просторах безграничных
жизнь весёлая идёт;
пашет трактор заграничный,
привлекая весь народ.

В поле лошадь, негодуя,
глаз косит на трактор тот:
на сверкающую "сбрую",

[1] *Серв* – крепостной крестьянин в странах Западной Европы во времена Средневековья (servutulo en la landoj de la Okcidenta Eŭropo dum Mezepoko)
[2] *Pio Dekunua* (lat. *Pius XI*) – Papo Roma inter 1922-1939.

pezebruas la motor'.

Kaj traktoron la junulo
gvidas tien-reen jen:
el sub radoj terobuloj
falas flanken' sur eben'.

Virgan grundon tre profunde
plugas la traktor' en mov';
ĝi samtempe ja ĝisfunde
plugas virgon de l'Malnov'.

Konvulsias sub traktoro
vermoj de la grasa ter',
time kuras for leporo
antaŭ forto de la fer'.

Sin krucsignas makjunino:
"Venas ruza antikrist'",
sed sentime sur maŝino
kantas kanton traktorist'.

Novan tempon, novan faron
venke portas la scienc',
liberigos ĝi homaron
je malnova viv' sen senc'.

Mesu Pio Dekunua[2]
pri malpia ruĝteror' –
Vin respondos tranĉdetrua
ruĝebrua plugtraktor'.

En kampar' sen lim' kuŝanta
gajaktivas kolektiv'.
Vokas nin traktor' pluganta
al labora nova viv'.

Voznesensk, 9 Marto 1930

на грохочущий "живот".

Парень ловкими руками
водит трактор по полям:
от колёс земля пластами
падает по сторонам.

Трактор вспахивает кругом
неприступность целины;
он же вспарывает плугом
залежалость Старины.

Трактор, в жирный грунт
вгрызаясь,
рубит червяков сплеча;
в страхе убегает заяц
от стального силача.

Крестится старушка ажно:
"Вот идёт он, антихр**и**ст!",
но в кабине преотважно
распевает тракторист.

Свет нести прогресс стремится
человечеству во мгле,
чтоб по-новому трудиться
мог крестьянин на селе.

Кару божью призывает
Пий на наш безбожий край –
красным шумом отвечает
трактор, пашущий взакрай.

На пространстве старосветском
новой радости прилив.
Пашет трактор наш, советский,
созывая коллектив.

ALEKSANDR ĈIĴEVSKIJ (1897 – 1964)



La nomo de la mondfama sciencisto Aleksandr Leonidoviĉ Ĉiĵevskij estas plej ofte menciata konekse al esploroj de la Suno kaj ĝia influo al ĉio en la kosmo, inkluzive la vivon de la Tero. Li estas fondinto de la heliobiologio kaj kosma biologio. Li estas kreinto de aerojonizado – artefarita jonizado de aero por diversaj celoj de medicino kaj nacia ekonomio. Liaj sciencaj verkoj estas eldonitaj en la franca, germana, angla, itala, hispana, sveda, turka lingvoj. Lin distingas enciklopedieco, kiu rememorigas pri famuloj de la Renesanco. En la Unua tutmonda biofizika kongreso en Novjorko la kolegoj en la speciala memorando nomis lin Leonardo da Vinĉi de la 20-a jarcento. Li estis ankaŭ talenta poeto, pentristo-pejzaĝisto, muzikisto. Lia poezia kreado estas kunligita kun tradicioj de la rusa filozofia kaj pejzaĝa liriko. Liajn versaĵojn aprobis V.Majakovskij, P.Florenskij, M.Vološin, V.Brjusov, A.N.Tolstoj. Li ellaboris projekton de la Akademio de Poezio – centro de la poezia, arta kaj kultura vivo de Rusio, rezulte de seriozaj meditoj pri sortoj de la rusa poezio kaj ĝia rolo en edukado de la popolo. Omaĝe al lia 120-a naskiĝdatreveno (kiu okazis la 7-an de februaro) estas proponataj kelkaj liaj versaĵoj kun la faritaj de mi E-tradukoj.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

***

В смятенье мы, а истина – ясна,
Проста, прекрасна, как лазури неба:
Что нужно человеку? – Тишина,
Любовь, сочувствие и корка хлеба.

Kirliĝas ni, sed simplas, klaras ver'
La rava, kiel blu' de firmamento:
Kio necesas por la hom' sur ter'?
Pankrusto, paco, amo kaj kunsento.

Сванте А. Аррениусу

Не потому ль спокойна так природа,
Не оттого ль безумствуем мы так,
Что мраку мысли не видать исхода,
Вселенной же неведом этот мрак.
В ней всё так просто, лучезарно-ясно:
Рожденье! Смерть! – Блаженный мир во всем.
И вопль души, неистовой и страстной,
Увы, смешон пред вечным торжеством.

Al Svante A. Arrenius

Ĉe tia kvieteco de l' naturo
Ni frenezumas en la vivorond'.
Ja l' pens' tenebras ĉiam sen mezuro,
Ne ekzistante por la kosma mond'.
En ĉio simpla, sunradie klara:
Beata monda pac' – naskiĝ' kaj mort'.
Kaj animkri' pasia kaj amara
Ridindas ĉe l' eterna kosma fort'.

***

Что может быть ужасней и грустней,
Когда ты, истину открыв, ее провозглашаешь,
И вдруг узнаешь,
Что уж давным-давно известно всем о ней!

Kio pli frapas ol terur' kaj trist',
Se via ver' trovita viavorte emocias
Kaj vi ekscias,
Ke jam delonge ĝi banalas pri l' ekzist'.

Сцевола

"Смотри, тиран", – сказал Сцевола
И руку положил в костёр,
Что вразумительнее слова,
Но жест был дьявольски остёр.

"Не я один – за мною смелых
Таких, как я, не перечесть!

Смотри, тиран, как тлеет тело,
Но римская не тлеет честь!”

Scevolo

“Vidu, tiran’,” – Scevolo montris
Al sia man’ en lignoflam’.
Pli ol konvinkaj vortoj tondris
Akrega gesto de l’ proklam’.

“Ne nur mi estas kuraĝulo,
Sennombras tiaj, kiel mi!
Rigardu al la korpobrulo –
L’ honor’ ne brulas en Romi’!”

***

Нестройный шум толпы. Нестройный шум лесов...
О, в этих первобытных шумах
Есть сходство странное: есть много голосов,
Твердящих об единых думах.

Они – глашатаи неведомых глубин,
Глубин таинственно-единых,
Они – предчувствия всеобщих нам судьбин, –
Мучительно-непостижимых.

Malorda bru’ de homamas’ kaj de arbar’...
Prahistoriaj tiuj bruoj
Similas kurioze al plurvoĉa mar’
En samaj viglaj pensofluoj.

Heroldas ili pri l’ vivunueca fort’
Mistera, kerna, fundamenta
En l’ antaŭsentoj de komuna nia sort’
Je l’ nekompreneblec’ turmenta.

Растения

Какой порыв неукротимый
Из праха вас подъемлет ввысь?
Какой предел неодолимый
Преодолеть вы задались?

В пустынях экваториальных,
В полярных стужах и снегах,
Сквозь пыток строй первоначальных
Одолеваете вы прах.
Кому здесь не дано покоя,
А лишь волнение дано,
Тот знает истину: живое
Затем, чтоб мыслить, рождено.
И в шёпоте листов неясном
Тому слышна живая речь,
Кто в мире злобном и пристрастном
Сумел свой слух предостеречь.
О, этот слух мы возлелеем,
Чтоб ваш ответ дошёл живым:
“Мы чувствовать, страдать умеем,
Мы мыслить – сознавать хотим!”

Plantoj

Kiu elan’ senbride febra
El cindro altenigas vin?
Kiu do lim’ neatingebla
Al si vin vokas plu sen fin’?
En dezertego ekvatora,
En ĉepolusaj frid’ kaj neĝ’
Tra l’ torturanta pen’ fervora
Triumfas via vivostreĉ’.
Kiu ne estas menspasiva
Kaj vojas laŭ peniga pad’,
La veron scias: ĉio viva
Naskita estas por pensad’.
En foliara flustro svaga
Li aŭdas vortojn de l’ vivem’,
Gardante sin en mondo l’ plaga
Kontraŭ kolera ĝia prem’.
La homon plantoj emocias,
Ke li memoru ĉiam pli:
“Ni senti, ni suferi scias,
Kompreni, pensi volas ni!”

8-a Moskva Esperanto-renkontiĝo

La 5-an de februaro okazis la 8-a Moskva Esperanto-renkontiĝo. Laŭ la reeĥoj de la ĉeestantoj ĝi estis ege sukcesa. Kiel kutime, ĝi daŭris ĉ. 10 horojn.

Ĉi MER atingis vican rekordon (por unutagaj MER) pri la kvanto de partoprenantoj – 22, inter kiuj estis gastoj el Ukrainio kaj Belgio kaj 3 denaskaj esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj estas fluaj parolantoj de Esperanto. Unu el perloj de la programo estis prezento de nova libro, eldonita de "Impeto", pri la konata Esperanto-poeto Konstantin Gusev. Dum la aranĝo tradicie okazis abunda manĝado, kiu ĉifoje transformiĝis al vera bankedo kun bongustaj diversspecaj manĝoj, preparitaj de Anna Striganova, ĉampano kaj dolĉaĵoj, inkluzive profesie preparitan torton forme de la Esperanto-flago, kiun alportis Vera.

Programo: **Signifo de la antikva greka filozofio por Esperanto** (*Nikolao Gudskov); ***Premiero de la libro pri Konstantin Gusev** (ruslingve) *(Viktor Gusev)*; **Kristin Tytgat respondas** (en formo de intervjua konferenco); **Literatura vespero** (*Valentin Melnikov, Aleksej Nistratov);* **"Ronda tablo" pri la revuo *Esperanto* kun la novaj redaktoroj Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko**; **"Mi estas pokalo de belpoezio"** (omaĝe al la 120-jara naskiĝdato de Eŭgeno Miĥalski. Novaj tradukoj de liaj poemoj) *(Ludmila Novikova);* **Komuna kantado** *(Mikaelo Povorin);* **Aktivulo.net: nova retpaĝaro por Esperanto-aktivuloj** *(Dima Ŝevĉenko).*

Fotojn de la renkontiĝo vidu ĉe Facebook:
<https://www.facebook.com/dmitry.shevchenko.1690>.

Dima Ŝevĉenko (Moskvo)



JUBILEAJ DATOJ DE LA JARO 2017

Jevgenij Salnikov (1907 – 1979) – 110 jaroj
E-renkontiĝo kadre de Junulara Festivalo en Moskvo – 60 jaroj
Fondo de Moskva junulara E-grupo "Fajrero" – 60 jaroj
03.01 – *Tatjana Vŝivceva* – 50 jaroj
21.01 – *Eŭgeno Miĥalski* (1897 – 1937) – 120 jaroj
27.01 – *Marko Zamenhof* (1837 – 1907) – 180 jaroj
27.02 – *Anatolij Radajev* – 60 jaroj *(dekstra foto)*
14.04 – *Ludoviko Zamenhof* (1859-1917) – 100 jaroj post la morto
23.04 – *Ivan Ŝirjaev* (1877 – 1933) – 140 jaroj
16.05 – *Nikolaj Lozgaĉev* (1957 – 1998) – 60 jaroj
11.06 – *Antoni Grabowski* (1857 – 1921) – 160 jaroj
11.06 – *Valentina Spicina* – 75 jaroj
08.07 – *Jefim Zajdman* – 80 jaroj *(maldekstra foto)*
18.07 – *Valentin Melnikov* – 60 jaroj
26.07 – *Unua Libro* – 130 jaroj
09.08 – *Vladimir Izosimov* (1947 – 1998) – 70 jaroj
11.08 – *Edgar von Wahl* (1867 – 1948) – 150 jaroj
13.09 – *Aleksandr Ŝevĉenko* (1957 – 2012) – 60 jaroj
19.09 – *Nina Zueva* – 75 jaroj
22.09 – *Marija Prilepskaja* – 70 jaroj
08.10 – *Viktor Kudrjavcev* (1957 – 2014) – 60 jaroj
14.10 – *Boris Tokarev (B.Tornado)* (1927 – 1994) – 90 jaroj
14.11 – *Ernest Drezen* (1892 – 1937) – 125 jaroj
24.11 – *Anatolij Masenko* – 80 jaroj
02.12 – *Aleksandr Malacion* – 50 jaroj
23.12 – *Nina Djomuŝkina* – 60 jaroj



